6-a Jaro. N-o 275 APERAS  SEMAJNE Leipzig, 9./1. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerhner

LA MONDO ESTAS UNUO

La fakto, ke la senlaboreco en Anglio estas esence dependa de la ekonomiaj movoj de l' mondo, estas evidenta, ne nur en la okuloj de l' specialistoj, sed eĉ en tiuj de ĉiu nezorgema brita civitano. Do, kiam iu inter ni, eble iom malpacienca pro la provincismo de l' ŝtatgvidantoj, pledas hodiaŭ favore je mondaj solvoj por la problemoj, kiuj ampleksas la tutmondan komunon, ni faras nenian alvokon pri regno de dio sur la tero . . . Ĉar la tutmonda komuno ne estas utopio apartenanta al tiuj nebulaj regionoj, kiujn oni atingi dezirus, sed nuntempa fakto meze de kiu ni vivas kaj batalas kaj kiun ni estas destinitaj simple koncepti kaj realigi . . .

Angla ministraro decidas konsenti monhelpojn al sia landa karbindustrio: tuj multaj miloj da hispanaj ministoj estas kondamnitaj je senlaboreco kaj mizero. Franca registaro decidas invadi la Ruhr-teritorion kaj ĵetas tiel nubon sur la eŭropajn aferojn, sed por Anglio tiu ĉi nubo signifas mon-duobliĝon: la germana pezindustrio kompensas la deficiton je brulŝtofoj de la Ruhr, farante grandajn karbmendojn en Kimrio. Usono decidas sin mem protekti kontraŭ la tento drinki, malpermesante la fermentitajn trinkaĵojn, kaj, puŝite de sia entuziasmo, aplikas la malpermeson al siaj komercistoj: la rezulto estas negoca progreso ĉe ĉiuj ŝipveturaj linioj aliaj ol tiuj troviĝantaj sub la usona suvereneco. Agitado favora je pli granda konsumado de fruktoj okazis en Anglio pro sankaŭzoj kaj la efikoj sentiĝas en oriento de Hispanio per pliiĝanta prosperado de l' oranĝ-produktistoj. Tio estas la malgrandaj flankoj de l' interdependeco. La fakto, ke la mondo fariĝas unu sola merkato, ke ekzistas mondprezo, konata tagon post tago, por ĉiuj gravaj krudmaterioj: greno, karbo, petrolo, kaŭĉuko, metaloj, estas ankoraŭ multe pli sentebla.

Sed la tutmonda interdependeco ne estas nur limigita al la materia vivo. Malgranda privata komitato el ekspertoj de la modo teniĝas ie en Parizo — kaj la virinoj de l' tuta mondo estas devigataj montri multe pli de siaj kruroj kaj de sia dorso ol ili iam volus fari kaj forgesi, kion ili lernis kiel limojn netransireblajn de la deco, ĉar, tiel asertas la franca vendistino: "La modo estas ĉiam deca." La filmo faras la modon hejma al la mondo. Japanio ne plu estas mistero por la serba kamparano, nek Portugalio senenhava vorto por la rusa muĵiko. La vizaĝoj, la tipoj, la kostumoj, la gestoj, la moroj de ĉiuj homoj partoprenas hodiaŭ en la konscienco de ĉiuj homoj.

Ne plu estas necese por koncepti esence kaj emocie, kion amas la mondo, posedi riĉon aŭ entrepreni vojaĝojn, nek havi kulturon, liberan tempon kaj guston legi librojn kaj la imagon por ilin alsimiligi al realoj. En grandioza viv-impulso la mondo, per kino kaj radio, penetris sin mem; ĝi konsciiĝis pri si mem; ĝi konigis sin kaj unuigis sin.

Neniu ĵurnalo povus vivi, se ĝi limiĝus je la novaĵoj de sia propra urbo kaj de sia propra nacio. Ĉiuj legantoj, eĉ la plej furiozaj naciistoj, volas legi kaj scii, kio okazas en la mondo. Eĉ tiuj, kiuj malamas la veron de tiu ĉi ideo kaj kiuj kontraŭbatalas ĝin, agas malgraŭ tio por ĝi kaj riĉigas ĝin. La mondo estas viva kaj formante ĝian parton, ni ne plu povas eviti ĝin, kiel ni ne povas eksalti el nia propra haŭto. Eĉ la naciismo fariĝis internacia fenomeno helpanta al la mondo ekhavi pli fortan konscion pri si. Ke usona ĉarlatano pagigu sin por ĵeti maltrankvilon inter Anglion kaj Usonon, — kaj la rezulto estas nova disvolviĝo de l' anglo-usonaj rilatoj, reciproka pli intima interkonatiĝo de tiuj du nacioj, fine pliriĉigo de la tutmonda konscienco.

Sed tiam, oni demandos, por kio batali? Se la tutmonda komuno devas veni, kial ĝin defendi kaj kial labori en tiu ĉi direkto? La respondo estas, ke kruda kaj sensperta maldelikategulo, kvankam plene konscia pri sia ekzisto kaj sia unueco, tamen devas esti edukata. Ĉar la konscienco per si mem estas bruta kaj mallerta: ĝiaj mensaj, moralaj kaj eĉ fizikaj kvalitoj estas nedisciplinitaj, malhavas ĉian senton pri proporcio kaj hierarkio. La samo valoras por la mondo. Kvankam unuo, la mondo estas ankoraŭ tute ĥaosa. Mankas la necesa kunligiĝo inter ĝiaj mensaj, moralaj kaj fizikaj kapabloj. Ĝi estas kaprica kaj fantazia, ofte preskaŭ freneza. La militoj agitas ĝin kaj ĵetas ĝin ekster ĝian normalan vivon, kondukante ĝin al la rando de ĝia mem-detruo: la komerco, sango de ĝia korpo, estas forlasita al kapricaj kaj egoistaj movoj de siaj multoblaj membroj kiel homo, kies arteria sistemo estas malordigita . . .

Mallonge, la mondo ne ankoraŭ disvolvis la necesajn instituciojn por ke ĝia vivo forpasu en bona sano kaj por ke ĝia unueco manifestiĝu en kreaj vojoj . . .

S. de M.

★ NE FORGESU JAM NUN ALIĜI AL LA X-a KONGRESO DE SAT EN LONDONO, 3.—7. AŬGUSTO 1930! ★

FRATOJ, K-DOJ-HUNGAROJ

Al ĉiuj estas konate, ke ni per la volo de magnatoj-bienuloj k kapitalistoj en j. 1914 estis disŝiritaj de niaj parencoj k ĵetataj kontraŭ rusaj laboristoj k kamparanoj. La sango fluis torente. Viktimoj ambaŭflanke estis grandegaj. Tiam ni estis malspertaj, k nia hungara burĝaro utiligis nian malsperton por siaj imperialistaj interesoj. Bedaŭrinde ni batalis kiel leonoj kaŭzante grandegan malĝojon al niaj K-doj — rusaj laboristoj k kamparanoj, je kio ni sincere pentas. Ni trafis la militkaptitecon. Troviĝante en tiu stato ni komencis pripensi la okazojn. Al nia vekiĝo helpis krome jena cirkonstanco: ni vidis, ke la plej bonaj filoj de niaj gepatroj mortis pro malvarmo k kozakaj vipoj. En la tendaroj, kie ni troviĝis, ni krom la turmentoj de junkroj ankaŭ estis turmentataj de niaj burĝaj k grandkampulaj popolaĉoj, kiel estis ĉe ni hejme en Hungario.

Dank'al netolereblaj kondiĉoj de l' kaptiteco multaj el niaj fratoj sin mortigis. Ĉio tio fariĝis antaŭ la okuloj de hungara k rusa burĝaro je la nomo de kapitalo. Ni ne estis konsiderataj kiel homoj k por ni estis malpermesite interrilati kun rusaj laboristoj pro timo de interfratiĝo. Venis rusa Oktobro — proleta revolucio. La caraj pafilpikiloj estis forigitaj per la manoj de rusaj laboristoj k kamparanoj k bolŝevikoj malfermis antaŭ ni la tendar-enirejojn; ni estis liberigitaj per la Marks-vortoj: "Proletaro de la mondo, unuiĝu!" por la komuna batalo kontraŭ la vipo de homaro — kapitalismo.

Nun ni eksentis la veran liberon. Gefratoj! Vi ne povas imagi ĉi tiun ĝojan minuton, kiam ni helpataj de bolŝevikoj forĵetis la pezan ĉenon de sklaveco. De tiu minuto ni fariĝis plenrajtaj civitanoj de libera Sovetio. Ĉi tie ni konvinkiĝis, ke Sovetio estas patrio de tutmondaj proletoj. Bolŝevikoj konsiderante nian kapablon en batalo proponis al ni diversajn regnajn postenojn, partoprenon en Ruĝarmeo k komunan batalon de malriĉuloj. Konsiderante la pravon de l' bolŝevika batalo ni komencis sen ia ajn hezito helpi al ili, ĉar ni ekkomprenis, ke interesoj de rusaj lab. k kamparanoj estas la samaj interesoj kiel tiuj de hungaraj lab. k kamparanoj k ĝenerale tiuj de subprematoj ĉiulandaj.

Gefratoj! Ne kredu al hungaraj naciistoj, kiuj penas primensogi la patrion de laboristoj, liberan Sovetion. Ni loĝantoj ĉi tie en malproksima Siberio estas la plej bonaj atestantoj por bolŝevika potenco. La faŝista registaro de admiralo Horti ne zorgu pri ni. Eĉ unu groŝon ne donu al faŝistaj provokistoj de nia liberigo! Ĉi tie en Siberio ni sentas nin pli libere ol niaj fratoj hejme en faŝista Hungario. Ne donu la eblon vin trompi al la malicaj hungaraj faŝistoj-ekzekutistoj! Dank'al bolŝevikoj ĉi tie estas ne unu hungaro, kiu ne partoprenus la konstruadon de socialismo. Ĝi estas nia sankta proleta devo. Ni helpu al ili k poste ili helpos al ni. Ĉu vi aŭdis pri tio, ke ie la hungaraj laboristoj partoprenis la regadon de l' lando? Jes, K-doj, ĝuste ĉi tie en Sovetio! Anstataŭ monsubteno por nia "liberigo" kolektu la monon por la batalo kontraŭ tiuj, kiuj penas vin trompi je la nomo de faŝismo k ŝovinismo.

Finfine ni petas vin, karaj fratoj: Sendu ĉi tien delegitojn-laboristojn k montru al ni k ankaŭ al rusaj laboristoj la difektojn, kiujn vi povas rimarki dank'al viaj pli bonaj teknikaj scioj. Vivu la Soveta Hungario! Vivu Sovetio! Vivu la Soveta potenco en la tuta mondo!

Irkutsk, 8. XII. 1929.

Subskribo de ĉiuj hungaroj k stampoj.

PROVIZORA FINO DE LA KONSTITUCIA BATALO EN AŬSTRIO

Post longa disputado, post kriadoj k minacoj, post laciga gazetara milito, post timigo de la tuta loĝantaro la batalo pri la nova konstitucio atingis provizoran finon per decido de la parlamento. La politikaj partioj debatis pri la kondiĉoj de la kreenda leĝo k ili *devis* trovi finan solvon, unue ĉar la eŭropaj ŝtatoj jam malpacience rigardis la evoluon de la aferoj k plie, ĉar Aŭstrio urĝe bezonas eksterlandan krediton por sia tre malforta ekonomio. La parlamenta decido estas plena malvenko de la faŝistoj, kiuj antaŭe fanfarone proklamis arogajn postulojn. Jen ilia programo:

La rajto nomi el siaj vicoj la ŝtatprezidanton, fermi la parlamenton (escepta stato), memstare dekreti leĝojn. La rajto konsistigi la registaron, memstare regi sen novaj elektoj, nomi registaran komisaron por la ĉefurbo Vieno, doni ordonojn al la urbestro de Vieno, nuligi decidojn de la komunuma konsilantaro, plialtigi la tarifojn de la poŝto, fervojoj k ŝtataj monopolfabrikoj sen aprobo de la parlamento, ĵurigi la faŝistajn trupojn kiel ŝtatan milicion k armi ilin, rangigi la lernejojn sub inspekton de la eklezio. Forigo de la respublika blazono, de la buĝet-decidrajto de la parlamento, de la asizjuĝejoj, de la kremaciejoj. Senlima dekretrajto por la polico en "okazoj de danĝero". — Konsilantaro de la liglandoj (provincoj), en kiun la plej malgranda lando (140 000 loĝantoj) elektas la saman nombron da reprezentantoj kiel Vieno (1 850 000 loĝantoj); konsilantaro de la profesioj (60 laboristoj ricevas same multe da reprezentantoj kiel 1 entreprenisto); reenkonduko de la nobel-titoloj k de la cenzuro; devigo ĉe parlamentaj elektoj; simpla plimulto por aliigoj de la konstitucio; disigo de la komunuma polico en Vieno en tempo de 3 monatoj. Permeso por reveno de la Habsburg-anoj; redono de la Habsburga posedaĵo al la dinastio, (la Habsburga havaĵo estis forprenata dum la revolucio k transdonata al la invalidoj). Degradigo de Vieno; ĝi ne plu havu la rajtojn kiel lando, sed nur kiel komunumo. Malpligrandigo de la impostoj por Vieno je 68 milionoj da ŝilingoj (ĉ. 4,5 mil da dolaroj). Forpreno de kelkaj leĝdonrajtoj de la komunumo Vieno rilate al hospitaloj, domkonstruado, komunumaj impostoj k lernejoj por instruistoj, k ankoraŭ aliaj similaj malpli gravaj deziroj . . .

Ĉi ĉiuj punktoj de la projektita konstitucio estis *tute malaprobataj,* ĉar la socialdemokrataj delegitoj rifuzis akcepti ilin. Tiuj esperoj de la faŝistoj restas sur la papero. Aprobataj estis nur tiaj kondiĉoj, kiuj ne tuŝas la sociajn rajtojn de la laboristaro, do nur maldanĝeraj paragrafoj, nome:

La ŝtatprezidanto estos elektata rekte de la popolo (kiel en Germanio); la registaro estos nomata de la prezidanto (ne plu de la parlamento), kiel en Germanio. La prezidanto rajtas en okazo, kiam la parlamentaj delegitoj ne *povas* kunveni, *provizore* dekreti (kun konsento de parlamenta komitato) ordonojn, sed *nur* por malhelpi "faktajn, ne plu kompenseblajn malutilojn por la popolo". Li *ne* rajtas aliigi konstitucian, socipolitikan aŭ impostan leĝon. Lia dekreto devas esti prezentata dum 4 semajnoj al la parlamento por aprobi aŭ malaprobi ĝin. La minimuma aĝo por rajti elekti nun estas 21 jaroj. La financajn aferojn de la komunumo Vieno rajtas kontroli la "Plej altranga juĝejo". La listoj de elektantoj estos farataj de la polico, interkonsente kun la komunumo. La polico en stratoj, teatroj k kinoj estos ŝtata.

Tio do estas la enhavo de la nova konstitucio aŭstria. La ventego de la popola indigno forpelis la atencojn faŝistajn, la harda kontraŭstaro de la laboristoj k la avertoj de la eksterlando malkuraĝigis la faŝistojn, la danĝera ekonomia stato k la agado de la ŝparuloj, kiuj ekperdis la konfidon al la valuto, ebligis la parlamentan ordigon de la konstitucia demando.

La batalo finiĝis. Kiu venkis? La opinioj estas diversaj, eĉ inter la faŝistoj k burĝoj. Kelkaj gazetoj triumfas: "Grandega sukceso kontraŭ la ruĝuloj!" Sed aliaj plendas, ke oni atingis

Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)

(Fino. Vidu n-ojn 267/74)

Konkludoj de Dübreŭj

Ĉu usonaj laboristoj venas Eŭropon por tie labori? Ne, ĉar la vivo estas ĉe ili en Usono pli facila, kaj neniam oni vidis laboristojn migri el lando de pli bona vivnormo al tia de suba vivnormo. Usonajn teknikojn oni ekakceptas en Francio, sed ne usonajn demokratiajn kutimojn. Tial "amerikanismo" (Telorismo, Fordismo), fariĝas pli malbona en Francio, ol en Usono.

Eksperimento de "Baltimore & Ohio" kaj similaj, montras, ke mastroj kaj laboristoj povas kunlabori. Dübreŭj citas agrablajn frazojn de grandaj mastroj: "Laboristaj organizoj... estas forto de "reaĉeto" (laŭbiblia senco) en la homa historio". Kompreneeble, tiuj sinjoroj deziras mildigi kontraŭecojn, gvidante mem la laboristan movadon, kaj religioj helpas. Dübreŭj vidas tamen grandan progreson en tiu kunlaborado inter laboristoj kaj kapitalistoj.

Li finas sian libron per kelkaj patriotaj frazoj: Anstataŭ revi pri estinto, ni francoj, ni agu! Ĉu ni ĉiam bezonos viziti usonanojn por kopii iliajn sukcesojn? Ĉu ni ne sukcesos per ni mem, pli frue ol la usonanoj mem?

Respondetoj de l' raportinto

Lenin iufoje karesis infanojn, vizitante sovetian lernejon. Li diris: "Feliĉaj infanoj! Ili laboros libere, homame. Eble eĉ ili ne komprenos niajn luktojn kaj kruelojn!" Poste Lenin iom pensadis kaj aldiris: "Kvankam mi ne plendas esti vivinta dum nia tempo. Ĝi estis ankaŭ interesa." Interesa estas ankaŭ la nuna epoko. Ni bone pristudu faktojn. Ni ĉiuj klopodu, laŭ niaj fortoj, same influi nian dumvivon, kiel Lenin mirinde faris. Ni bone kiom eble ĉion vidu.

La patriota fina rekantaĵo de Dübreŭj ne oportunas: teknikoj rapide imitiĝas de lando al lando. Ĉiu popolo inventas, kion ĝi scipovas inventi, laŭ klimato, historio, hazardoj. Kial ni 40 milionoj da francoj pretendus inventi pli, ol 120 milionoj da usonanoj, 60 milionoj da germanoj, 150 da sovetianoj, en ĉiuj industrioj aŭ artoj? *"Ĉiu popolo pretendas fariĝi la unua en ĉio"*, primokis tre prave hispana verkisto. La malnovaj civilizoj klopodu inventi, kiom ili scipovos. Sed se "novaj popoloj" ekinventadas, tio devas ĝojigi ĉiujn, estas pruvo, ke la mondo antaŭeniras, ne pruvo, ke la malnovaj civilizoj "malantaŭen marŝas". *(Metaforoj! Metaforoj!)*

Post tiu konstato, ŝajnas al mi, ke Dübreŭj akceptis *"blufon"*, kredante pri usona supereco en organizado. Mi konas multajn personojn, kiuj laboras kun usonanoj, en Usono kaj precipe en Francio, kie troviĝas pli lertaj "Janki"-oj, ĉar ili vojaĝis.

La laboro de l' usonanoj, precipe en oficejoj, estas senorda, malsimpla, ofte stultega. Ili kredas agi rapide skribante dudek leterojn pri afero, dum monatoj, anstataŭ bone pristudi ĝin kaj skribi unu aŭ du leterojn dum dek tagoj. Anglan lingvon ili fuŝadas. En iliaj teknikaj gazetoj estas amasoj da infanaj sensencaĵoj. Eĉ kiam ili skribas ion interesan en fakĵurnaloj aŭ gazetoj, ili verkas ĝin tiom malklare kaj malklere, ke necesas traduki ĝin en bonan lingvon, por kompreni kaj utiligi ĝin.

En ĉiuj industrioj, kie necesas "pura scienco", ekzemple en ĥemiaj industrioj (germanoj superas), en pontkonstruado, en precizvitraĵo, ili maltaŭgas. Iliaj tro multaj riveregaj akcidentoj rezultas de iliaj malsciencaj konstruadoj. La plej diversaj instruistoj plendis, la plej diversaj aŭtoroj montras, ke usonaj studentoj, estontaj teknikistoj, ne vizitas serioze lernejojn. Post lernejo, ili supraĵe instruiĝas en vivo. Tio en delikataj metioj ne sufiĉas.

Mi ne riproĉegas tion al usonanoj: ili laboru en siaj fakoj. Sed mi riproĉas al Dübreŭj, ke li tion ne vidis, ne spertis vizitante Usonon; ke li tiom admiris *interesegan* eksperimenton ĉe "Baltimore & Ohio", sed ne aŭdis nek raportis pri persekutado kaj mortigoj al laboristaj gvidantoj kaj laboristoj, kiuj ne akceptas *kunlabori*.

Nenion skribis Dübreŭj pri eĥoj de l' afero Sakko kaj Vancetti, simbolo de tiaj multaj aferoj en Usono, pri metioj, en kiuj usonaj laboristoj suferas mizeron, pri transportado de industrioj suden, en regionojn de malkara laborado, pri strikoj de teksistoj, vestistoj. Ĉu li fakte parolis, komprenis, legis anglan lingvon? Ĉu li nenion legis pri polica diktatoreco en Usono?

Jief.

---

nenion k batalis vane. Do la pasinta batalo estis nur etapo en la batalego kontraŭ la aŭstriaj marksistoj. Vere la socialdemokratoj konsentis aprobi kelkajn malgravaĵojn je intereso de la paco. La demokratismo venkis. Aŭstrio apartenas ankoraŭ al Eŭropo.

Pli grandan utilon ekkonis la laboristaro aŭstria en tio, ke dum la tuta batalo la eksterlandaj laboristoj senĉese interesiĝis pri ĝia sorto. Se io nin esperigis dum gravaj horoj, tiam estis tio, ke ni ne estis solaj, ke ĉiuj laboristoj de la najbaraj landoj sentis kun ni. La ideo de la internaciismo helpis al ni k tial ni ne povis esti venkotaj.

Observanto.

La kapitalistoj malatentas landlimojn

Ankaŭ en tiu ĉi jaro patriotaj entreprenistoj diverslandaj komune agis, fintraktis pri internaciskale organizenda ekspluatado. Germana kapitalo partoprenis fondiĝon de bankoj en Svisio (Consona A. G., Züriĥ), Usono (Sun Investing Co., Novjorko), Rumanio (Bukaresta Bankinstituto). Inverse eksterlanda kapitalo enfluas Germanion. Akcia Societo por orienta komerco transiras al anglaj posedantoj; germaniaj, svisaj kaj luksemburgaj monsumoj helpas fondi akcian societon por industrientreprenoj en Ŝafhaŭzen (Schaffhausen), Svisio. Minejaj kaj fer-kompanioj etendas la manojn al translimaj fratoj-malamikoj: Firmo Röĥling (Röchling) fondas samspecan entreprenon en Italio, Klökner (Klöckner) ekvivigas Karb-Kompanion (Charbonnière) en Parizo, Krupp starigas "Central Alloy Steel Co." en Usono. Kontraŭe, Karbon- kaj Ferminaĵa Kompanio eniras anglan posedon. En kemia industrio la internaciiĝo triumfegas pli kaj pli. I. G.-Farbindustrio germana monsubtenas usonan filian societon en Novjorko. Silkkompanio Bemberg helpe de japana kapitalo fondas filion en Japanio. En elektra industrio same fratiĝas la kapitalistoj. Usona "General Electric" (Ĝenerala Elektra) partoprenas per 16% ĉe germana inkandeska lampfirmo Osram kaj per 30% ĉe germana A.E.G. (Ĝenerala Elektra Societo). Entrepreno Siemens (Siemens), Berlin, fondas en Londono "Protos Electric". Telefona fabriko Berlina interrilatas kun Kolster Radio Ko., Novjorko-Londono. En vitra metio pli forte ekprenas franca trusto St. Goben (Gobain) germanajn vitrofirmojn, tiujn, kiuj produktas spegulan vitron; ĝi jam ĉirkaŭprenis ĉ. 80%. En aŭtomobila fako la akiro de l' germana Opelkompanio per usona "General Motors" kaŭzis grandan sensacion. Germana globlagra industrio senescepte troviĝas en manoj de svedoj.

Multe da similaj interkompreniĝoj diverslandaj okazintaj en lasta tempo estus ankoraŭ citeblaj. Kiam do la proletaro sekvos? Kompiltrad. 3018 Chemnitz.


KOMUNISTA BIBLIOTEKO

Eldonita de SEU-Moskvo

Serio da malkaraj libretoj, enhavantaj klasikaĵojn kaj aktualaĵojn de komunista literaturo.

	Prezo
1. **J. Stalin,** Pri Lenin . . .	0.30 mk.
2. **Manifesto de la 6-a Kongreso de Komintern**	0.20 „
3. **N. Lenin,** Pri religio . .	0.30 „
4. **Ŝejnman,** Milito kaj religio	0.40 „

La mendojn adresu al: **R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27.** Sovetianoj mendu ĉe CK SEU, Poŝtkesto 630, **Moskvo.**

MIKROBO DE KOLEKTIVISMO

Nuntempe en Sovetio grandskale malvolviĝas kolektivigo de la kamparan-mastrumo. Efektive por ĉiu ja estas kompreneble, ke nur grandspaca mastrumo povas apliki ĉiujn plej modernajn metodojn de l' agrikulturo, nur kolektivo disponanta sufiĉe grandajn monsumojn povos ekhavi la necesajn maŝinojn terkulturajn.

La kamparanoj komprenantaj avantaĝojn de kolektiva mastrumo en ĉiuj regionoj de vastega Sovetio kolektiviĝas. La registaro certe akcelas la procezon, ĉar, sendube, la "kolĥozoj" (kolekt. mastrumoj) abundkvante produktas grenon necesan por la urbanaro.

Jam pro sola fakto de sia ekzisto "kolĥoz" rompas kutimajn mastrumkaj soci-formojn de l' ĉirkaŭa vilaĝanaro. Ne povas ja la vilaĝanaro vivi malnovmaniere, se apude troviĝas "kolĥoz". En Mez-Volga provinco ankaŭ multaj "kolĥozoj" estis kaj estas organizataj. Pri unu el ili mi iom rakontos ĉi tie.

La komunumo "Karlo Marks" organiziĝis dum 1920, kaj jam post kelkaj jaroj la "mikrobo de kolektivismo" eniĝis apudajn vilaĝojn, kaj jen aperis diversaj kolektivoj: "Mateniĝo", "Roza Luksemburg", "Stepan Razin" . . .

Same kiel aliaj komunumoj "K. Marks"-komunumo travivis multegon da malfeliĉoj. Iam la komunumo eĉ estadis disfalonta. Sed efikis la "mikrobo" kaj la komunumo kreskas, fortiĝas . . Certe ne ĉio en ĝi statas bone, multon, tre multon ĝi bezonas por iĝi modela: forestas maŝinejo kaj la maŝinoj staras en korto; dume mankas loĝejspaco ktp. Sed malgraŭ ĉio la komunumo estas gravega faktoro de l' kolektivigo en sia regiono. Dum vintraj vesperoj en ĝi funkcias agronoma kurso, printempe kaj aŭtune plugaŭtomobiloj de l' komunumo plugas kampojn de ĉirkaŭaj malriĉuloj (kio jam montras avantaĝojn de modernaj iloj).

Nun, kiel rezulto de l' agado, estas organizita grandega grenproduktejo "La vojo al socialismo" — ĝi estas unu el la plej grandaj en USSR. La grenkolĥozo havanta 40 mil hektarojn da tero, estas 25 km. longa kaj 10—15 km. larĝa. Ĝia plugaĵo nigras de unu flanko de l' horizonto ĝis la alia.

La organizlaboro plejparte estis farata de l' K. Marks-komunumanoj. Dum la organizperiodo la komunumanoj preskaŭ ĉiutage ope vizitis la vilaĝojn por aranĝi kunvenojn, konversaciojn, por kontraŭbatali riĉulagitadon (nun en Sovetio la klasbatalo estas tre akriĝinta). Ne-multmembra komunumo (132 pers., inkluzive la infanoj) estiĝis kerno por organizado de l' kolĥozo-giganto.

Unuopulo hieraŭ fosaĉinta la teron per antikva plugilaĉo, hodiaŭ iĝas mastro de grandega laŭscience organizita mastrumo. Ĉar jen estas "peceto" 600-hektara por legomejo, jen aliaj terpecoj same "negrandaj" por aliaj fakoj de l' mastrumo; kompreneble laborante tiaskale oni povas apliki ĉiujn atingojn de agrikulturo.

Tiele efikas "mikrobo de kolektivismo", "infektanta" grandegajn spacojn de estinta "griza", malklerega "bastoŝua" Rusio. *12 115, Samara.*

"GERMANIO SUPER ĈIO!"

"Germanio super ĉio, super ĉio en tutmond'! Tio estis la kanto, per kiu oni ebriigis en 1914 la germanan laboristaron, por batali kontraŭ la "malamiko". Post la revolucio la tiama prezidanto de la respubliko Ebert proklamis ĝin kiel "germanan nacian himnon". Hodiaŭ ĉi tiu kanto estas ĉefe kantata de faŝistoj, reakciuloj. Nun mi volas montri, kiom la kanto pravas.

Germanio enhavas proks. 60 milionojn da homoj. Inter ĉi tiuj troviĝas 400 mil spirit-malsanuloj (frenezuloj), 90 mil epilepsiuloj, 371 mil kripluloj, 35 mil surdmutuloj, 36 mil blinduloj, 1 miliono da tuberkulozuloj, 300 mil grave alkoholmalsanaj personoj, 71 mil gejunuloj en ŝtataj zorgdomoj. 12 mil homoj lastjare preferis sin memmortigi, rezignante la "luksan vivon" en Germanio. Mankas en la lando minimume 5 milionoj da loĝejoj sufiĉe bonaj. 9 milionoj da homoj ne havas propran liton (oni dormas ofte 3- kaj eĉ 5-ope en unu lito). 1 miliono estas ĉiam senlabora. 2 pliaj milionoj ne havas plenan okupon. La cetera parto de la laboristaro laboregas 10—13 horojn tage. Vere, la mizero estas preskaŭ ne superebla! Do, kriu la faŝistoj: "Germanio super ĉio!" Sed ni — preparu la revolucion tutmondan!

SAT-ano 11 297.

Noto: Kompreneble similajn rimarkojn oni povus fari pri Francio, Britio k. a. landoj. Kaj la konkludo de tio estas, ke neniu proleto havas intereson oferi sian vivon por patrio.

ESPERANTISTA TRAKTORO

Originala rakonto

Tiun ĉi rakonton mi dediĉas al severa unueco de SAT post la IX-a Kongreso.

I.

La vilaĝo Ĉokurĉi estas bela krimea vilaĝo. Kuŝante apud montobazo de Jajl, ĉirkaŭprenita de vinberejoj, fruktoĝardenoj kaj malproksime — de vastegaj kamparoj de huma tero, — ĝi estas bela. En la vilaĝo loĝas rusoj kaj tataroj. La tataroj kulturas ĝardenojn kaj vinberejojn, kaj la rusoj plantas grenon. La tero estas sufiĉa, sed ekzistas unu malbono — mankas manoj por prilaboradi la grundon, kaj tial multaj terspacoj estas nek plugataj nek semataj. En unuaj tempoj la kamparanoj paciĝis pri tio. Kaj poste multaj vilaĝanoj, leginte lokajn ĵurnalojn kaj gazetojn por kamparanoj, en kiuj oni skribis, ke sovetiaj kamparanoj devas larĝigi terspacon kulturatan, plibonigi metodon de laboro por tero kaj pligrandigi rikolton sur siaj kampoj, — multaj vilaĝanoj decidis sekvi la konsilojn de l' sovetia registaro kaj ekplugi neuzitajn vastajn terspacojn. Sed bedaŭrinde plenumi tion kun helpo de plugilo ne estas ebla. Por tio oni bezonas traktoron. Sed la sovet-registaro ne estas riĉa; ĉie oni bezonas multon, kaj por Ĉokurĉanoj oni povas doni nur unu traktoron. Sed tio ĉi ne sufiĉas. Per sia traktoro la Ĉokurĉanoj plugis duonon da neuzita tero, sed alia duono da tero ne povis esti kulturata. Kaj la Ĉokurĉanoj ne scias, kion ili faru. Urĝe necesas havi duan traktoron . . . Tamen, de kie akiri ĝin?

II.

Andrej Roŝĉin estis sekretario de komjunulara ĉelo. Li estis 25-jara viro. Antaŭ unu jaro li alveturis en sian patran vilaĝon el Ruĝa Armeo, kie li servis kiel grupestro. Andrej estis klera homo kaj en Ruĝa Armeo li lernis multon. Li ekaŭdis en Ruĝa Armeo pri lingvo esperanto kaj finlernis ĝin. Kiam li revenis vilaĝon, li organizis grupon el kampar-junuloj por instrui al ili la lingvon esperanto. Jam depost unu jaro laboras ĉi tiu grupo, konsistanta el 15 partoprenantoj, kaj ĉiu el ili bone scias la lingvon. Andrej kaj liaj samvilaĝanoj komencis grandan korespondadon kun eksterlandanoj. Apartan lokon en ilia korespondado okupis tiu kun germanaj laboristoj en urbo Drezden, ĉar Andrej, kiam li ankoraŭ estis ruĝarmeano, partoprenis en kongreso de SAT kaj tie konatiĝis kun multaj K-doj el Drezden, aparte kun Hans Koppel. Ili fariĝis amikoj.

Andrej Roŝĉin tre bedaŭras, ke la kamparanoj de Ĉokurĉi ne povas prisemadi siajn grandajn malplenajn kampojn. Dum komunaj kunvenoj li multe parolis al siaj samkamparanoj pri ilia devo por ŝtato prisemi tiun ĉi kamparon. Li multe paroladis pri ĝi en vilaĝa soveto, kaj kiam oni decidis organizi kolektivan mastrumadon (ruse: kolĥoz) kaj akiri traktoron, li tre klopodis pri tio en oficejoj de l' urbo. La Ĉokurĉanoj bezonis du traktorojn, sed la urbo povis doni nur unu. Tamen jam ĝi estis bona komenco.

Sed Andrej ne volis trankviliĝi. Li volis akiri duan traktoron. En sia esperantista kaj komjunulara ĉeloj li multe paroladis pri tio, kaj unu fojon venis al li penso, ke per esperanto ili havigos al si duan traktoron.

III.

Andrej skribis al Hans Koppel kaj drezdenaj K-doj leteron. Tiu estis amikece skribita; en ĝi Andrej detale pri-

VAGANTA JUNULO EN ARGENTINO

Deknaŭjara sviso vojaĝis Argentinon, en julio 1929, serĉante ne riĉon, nur laboron, vivon, novon. Monatoj forpasis, oni komencis timi pro li. Ĵus nun lia patro ricevas lian unuan leteron, kiu interesegis jam ĉiujn manuskript-legantojn. Ĉar tre malmultnombraj estas Argentiniaj kamparaj raportoj en "S-ulo", jen tiu letero traduke iom resumita.

Tiu infano Marsel' F. ankoraŭ estas nek revoluciulo, nek sennaciulo. Liaj spertoj en grand-urboj kiel en la plej kamparaj regionoj de tiu nova lando Argentino estas malgraŭ tio jam revoluci- kaj sennaci-spiritaj. Ankoraŭ iu simptomo, ke vivo venas al ni. Vera socialismo kaj sennaciismo estas la naskiĝanta vivo mem.

Letero tute ne "verkita"; sed vivita frazeto valoras ofte multajn statistikojn. *(7369.)*

Kara patro,

Lacega, konsumite laca mi estas, do, ne tre lerta hodiaŭ vespere por "naski" agrablajn frazojn, — klare artikhavajn frazojn, kiel ci diris al mia fratino Ĵermen'. Sed mi pensas interesi cin rakontante miajn aventurojn, cin, antaŭa aventurulo ankaŭ.

Do, mi elŝipiĝas en La Plata. Senpage mi gardigas miajn pakaĵojn en "deponejo por almigrantoj", kaj mi tuj ekrimarkas, ke mi ne plu havas eĉ moneretton. Hodiaŭ sabate, bankoj fermiĝis je la dekkvina. Mi ne povas ŝanĝi mian ĉekon kontraŭ mono.

En ofico de transport-kompanio mi demandas adreson de svisa konsulejo, tre malproksima. Oni donas al mi dek centavojn[1], kaj Ford-ŝarĝ-aŭto de la kompanio akceptas min ĝis la tramstacio.

En svisa konsulejo, la konsulestro estas for. Ia "urso de Bern" (grumblanta oficisto) ricevas min, rifuzas konigi al mi adreson de du amikoj, kiuj antaŭ 15 tagoj alvenis ĉi tien, mi scias. Sed li donas al mi adreson de "Svisa Domo". En tiu domo, kvankam pli malfrue ol malfermaj horoj, (preskaŭ la 17-a horo vespere), pordisto konsentas permesi al mi eniron. Sekretario tute memvole pruntedonas al mi 5 pesojn. Peso: Argentina monero, valoras unu dolaron.

Fine mi trovas miajn du K-dojn, per ilia onklino. Morgaŭ ili estus forveturontaj Saavedr-on.

Post unu semajno, mi eklaboris ĉe Nestlé-fabriko. Kun miaj du K-doj, ni luprenas nemeblitan ĉambron: 20 *pesoj*. (Pomante? En Parizo, por tia lu-prezo, oni ricevus plurĉambran meblitan luksetan loĝejon!) Ni dormas sur planko, kaj ni laboregas 9 horojn tage, ricevante 50 centavojn (duon-peson) hore, do 4½ pesojn (dolarojn) tage.

Miajn du K-dojn post nelonge estroj fordungis-elĵetis. Mi stulte sekvis ilin. Denove serĉado por labori, konsum-laciga. Ni trovas lacigan laboron kaj nun loĝas en *germana* pensiono proksima al la laborloko. La prezo estis 80 pesoj monate, sed fine ili ne akceptis, ke ni pagu! Granda ĝardeno kun palmoj, bonega manĝado, gramofono, banĉambro, ĉiuj dormoĉambroj en ĝardenetaĝo kun fenestro-pordoj. Paradizo!

[1] Centavo estas proks. usona cendo.

Al la kamparo!

Mia K-do Ĵak petegis, ke ni forvojaĝu en "kampon". Mi estis kvazaŭ certa esti dungata kiel desegnisto por 200 pesoj monate ĉe agrabla laboro. Ni forlasis la Paradizon.

Ni vendas niajn plej bonajn vestaĵojn kaj forvojaĝas al Vedia. Tie, ne estis pluvo depost 5—6 monatoj. Nenia laboro por ni. Piede ni formarŝas el tiu stacio, piede sur fervojo, ĉar en tiu lando fervojoj estas la plej bonaj stratoj.

Venas tagmezo. Suno batvarmigas niajn kapojn, reloj blindige brilas. Jam de 24 horoj ni ne manĝis. Ratoj rifuĝas antaŭ ni. Nenia ombro, neniu homo. Ĵak ne plu volas antaŭeniri. Malfacile mi komprenigas lin, ke ni jam duonan vojon faris kaj preferinde daŭrigos marŝadon antaŭen, ne returnen.

Feliĉege, proksime je 600 metroj ni vidas "estancia"-n (farmobienon). Florida ĝi nomiĝas. Tie, nenia laboro por ni. Sed oni donacas al ni 8 kotletojn rostitajn sur krado, spicitajn per la tiea fluidaĵo: vinagro, salo, pipro, papriko.

Bonege!...

Ni trinkas multe da *"Mate"* (infuzaĵo el *Herbo de Paragvajo*. Oni nomas ankaŭ *Mate*, hispanlingve, la kukurbon, el kiu indiĝenoj de Sud-Ameriko trinkas *Mate-fluidaĵon*.) Poste ni formarŝas. Vespere ni alvenas

---

skribis la vivadon en Ĉokurĉi, skribis pri malplena huma kamparo kaj pri tio, ke ili organizis kolektivan mastrumadon kaj akiris unu traktoron. Sed ke unu traktoro nesufiĉas kaj tial li, je nomo de esperantista kaj komjunulara ĉeloj kaj kamparanoj petas siajn fremdlandajn amikojn helpi al ili kaj alsendi traktoron. Tio ĉi estos tre bona donaco de germanaj laboristoj kaj pruvos solidarecon de laboristaro kaj kamparanaro de Germanio kaj Sovetio. Ĉu povos liaj amikoj alsendi traktoron? Li esperas, ke ili ekpovos. Helpu al ili germanaj laboristoj! —

Andrej sendis la leteron kaj komencis atendi respondon. Li al neniu parolis pri sia entreprenon. Li timis fiaskon de sia afero. Ĉu ekpovos germanaj laboristoj helpi al ilia komenco?

IV.

Pasis jam du monatoj. Andrej ne ricevis ankoraŭ respondon el Drezden. Li ne sciis kion fari, kion pensi. Kial Hans Koppel silentas? Ja, por ricevi respondon el Drezden, oni bezonas nur du semajnojn, sed jam pasis du monatoj. Malgaja estis Andrej.

Fine, en la fino de l' somero, sur la tablon de Andrej estis ĵetata dika letero, kun stampo de Drezden kaj skribita per la bone konata skribmaniero de Hans Koppel.

Per tremantaj fingroj kaj kun furioze batanta koro, Andrej disŝiris unu randon de l' koverto.

— Plej kara amiko! — skribis Hans.

— Pardonu, ke mi tiel longe ne skribis al vi... Por ĉi tio estas grava kaŭzo... Mi kun ĝojo sciigas al vi, ke ni, drezdenaj laboristoj, hodiaŭ sendis al vi traktoron; do kelkajn tagojn post ricevo de tiu ĉi letero, vi ekhavos traktoron.

— Kiam mi ricevis vian leteron pri traktoro, mi sciigis ĝian enhavon al ĉiuj esperantistoj kaj poste al niaj laboristoj. Ni ĉiuj decidis kolekti monon kaj sendi al vi la petatan traktoron. Ni ne povis kolekti tuj la tutan monon. Tial mi tiom longe ne skribis al vi leteron; mi volis skribi nur tiam, kiam ni sendos la traktoron. Helpu tiu ĉi traktoro en via laboro — konstruo de socialismo, en tutmonda laborista solidareco... ktp. ktp. —

Kvazaŭ freneza alkuris Andrej en vilaĝan soveton kaj svingante per letero ĝojkriegis: — Ni ricevos duan traktoron!... La germanaj laboristoj sendis ĝin al ni!... Ni ricevos "esperantistan traktoron"...

V.

Post semajno estis ricevita sciigo de l' fervojo, ke por kolektiva mastrumado alvenis sendaĵo — traktoro el Germanio, el Drezdeno.

La tuta vilaĝo nun parolis nur pri traktoro kaj pri esperanto. Multaj el la kamparanoj ne kredis, ke la traktoro el Germanio — estas vero.

Frumatene Andrej kaj aliaj veturis stacidomon (je 5 kilometroj) por ricevi la traktoron.

Posttagmeze kamparanaj buboj ekkriis tra la tuta vilaĝo, ke veturas la nova traktoro. Ĉiuj elkuris straten kaj ekvidis, ke ilia unua traktoro elveturis renkonte al sia dua kolego kaj ke ambaŭ traktoroj, akompanataj de homamasoj, traveturis straton kaj haltis antaŭ la domo de l' vilaĝa soveto. Komenciĝis amaskunveno. Sur la dua traktoro flirtis flago kun esperanta verda stelo. Sur la flanko de l' dua traktoro estis skribita "Esperantista traktoro, donaco de germanaj laboristoj"...

Sekvantan tagon, matene, du traktoroj elveturis kamparon por plugi ĝin.

E. V. Ivnickij, Simferopolo.

en "estancia las Balas" (farmo "la Pilkoj" aŭ "la Kugloj") — nia celo.

Modela farmobieno, kompleta vilaĝo el puraj ridantaj dometoj por la "peones" (taglaboristoj-vagantoj) kaj iliaj familianoj. "Las Balas" estas unu inter la tre malmultaj farmobienoj, kie akceptiĝas *"Peon"-oj* kun familio.

Mi elpoŝigas leteron por la farmestro. Varmsimpatie oni ricevas nin. Francon kaj svison oni prezentas al ni francparolantoj. La franco estas meĥanikisto, prizorgas elektro-fabrikon. La sviso analizas-kontrolas la laktojn. Dum tri tagoj ni loĝas en dometo apud laktodomo. Iajn vesperojn en la ĉambro de la franco ni estis sepope: tri svisoj, du germanoj (maŝinisto kaj ĝardenisto), hungaro kuiristo), skoto. Ĉie gastemo, en argentina grandkamparo. Ĉie oni donis al ni "ion", tio estas unu aŭ du pesojn, 2 kokojn, unu paperkonus-plenon da ovoj, pecojn da bovidaĵo ktp.

Bedaŭrinde, tie en "Las Balas", nenia laboro por ni.

Ni formarŝas ĝis Al Berdi, en *"La Pastoril"* (la Paŝista), grandega farmobieno kun 350 ĝis 400 peonoj, loĝigitaj tiel malbone, ke oni ne kuraĝus same loĝigi porkojn. Forĵetinda nutraĵaĉo.

Novaj motor-kamplaboriloj alvenis tie: laboron eble ni ricevos. Ni tie dormas: privilegio malfacile konsentata al vaguloj, ĉar ĉiuvespere pli ol 150 da tiaj petas dormlokon ĉe "La Pastoril". (Eble tiu farmobieno kuŝas proksime al ĉefaj stratoj? Rim. de l' trad.)

Kuŝigitaj sur tero inter *peon*oj en dometaĉo, je unua horo matene ni decidas formarŝi. Dudeko da cimoj jam kuradas sur miaj vestaĵoj. Vagonaron al Bonaero (Buenos-Aires) ni ekvidas, sed alvenas tro malfrue en la stacidomo. Ĝis la 7-a matene ni dormas sur benkoj en la staci-atendejo. Estas malvarmege.

Je la 9-a ni envagoniĝis al Bonaero. Nia unua laborserĉo sur grandkamparo estis malsukcesinta.

Alejandro, 22. 10. 29.

Marsel' F. Libera traduko de 7359.

(Finota.)

DOKUMENTOJ DE KOMUNISMO

Tiu ĉi dokumentaro pri komunista movado entenas ne nur la faman Komunistan Manifeston de Marks k Engels, sed plie la Programon de la rusa komunista partio (bolŝevikoj), la Konstitucion de RSFSR k Manifeston de l' Tria Internacio al la tutmonda Proletaro. Ĝi estas unu el tiaj helpiloj, kiajn oni ofte serĉas sur sia librobreto.

Form. 11×17 cm. 132 pĝ.

Prezo 1.— mk. g.

Mendu ĉe *Administrejo de SAT, Leipzig O 27, Colmstrasse 1 (Germ.)*

Ĉu art-centro en Amsterdamo?

En Amsterdamo estis fama konstruo, nomita "Paleis voor Volksvlyt": Palaco por popol-diligento. Ĉi tiu konstruo havis historion ankaŭ en la laborista movado amsterdama. Grandaj kunvenoj okazis tie, kiuj influis la holandan historion. Tie paroladis niaj K-doj, la pioniroj por nia holanda movado socialisma, kaj ni amsterdamaj laboristoj grandamase aŭskultis al iliaj vortoj, kiuj trafis ĉiun laboriston en la koron. Pro tio frapis forte, tie, la koroj de la laboristoj multfoje, sopirantaj al liberiĝo el la mizero.

La "Palaco", kiel ni nomis ĝin, kuŝis en la mezo de la urbo kaj aspektis bele kun sia ĉirkaŭo. Por ni enloĝantoj, Amsterdamo ne ekzistus sen la "Palaco". Ĝi estis impresa...

Kaj nun... la "Palaco" ne plu ekzistas; ĝi tute forbrulis. Amsterdamo nun estas sen sia "Palaco". Malplena estas la spaco, kie iam staris ĉi tiu konstruo bonkonata de ni laboristoj, kiuj iris tien por fortigi sian batalemon, forigi sian malkuraĝon, al tiu loko, kie tiom multfoje parolis la proleta koro.

Kompreneble estas, ke diversaj planoj nun eknaskiĝis por konstrui novan palacon. Unu el ĉi tiuj planoj mi nun volas priskribi, ĉefe ĉar ĝi havas en si la socian ideon: p e r kaj p o r la komuneco. — Ĉar la ekspluatado estas tre malfacila pro la alta prezo, kiu estas bezonota por jam aĉeti la grundon, la posedantoj de akcioj en la "Palaco" mem ne volas rekonstrui ĝin. Ili preferas vendi ĝin, ĉar per tio ili akiros pli grandan gajnon. Oni devas serĉi eblan solvon, el kiu ne bezonas rezulti profito, sed malgraŭ tio nepre devas estiĝi io, kio havas valoron. Tian enhavon kunportas tiu ĉi aludata plano.

K-do J. J. N. E k s t e r (Exter) prezentis al la magistrato de Amsterdamo projekton por granda a r t - c e n t r o en Amsterdamo. En ĉi tiu la popolo povos trovi potencan impulson, kiu influos ĝian spiriton. Ĝi estu centro, kiu montriĝos esprimilo de la povo, kiun posedis geniuloj kaj kiu parolas al la homa koro. Tiu povo esprimiĝas en la a r t o per la kreanta energio, kiu ankaŭ dormetas kaj pli kaj pli vekiĝos inter la proletoj de ĉiuj landoj. Pro sia kuraĝa plano la K-do ankaŭ jam akiris promesojn de alilandanoj je kunhelpo per fondo de simila tia centro ankaŭ en aliaj landoj, kun la celo plifaciligi i n t e r - ŝ a n ĝ o n d e a r t o inter la diversaj popoloj kaj por ke kresku la interalproksimiĝo de l' popoloj ĝis unu tuto. Tian tutecon la homoj ja povas trovi en la arto, kiu parolas al ĉiu pri la sama dormanta energio, vivanta latente en la homo. Ĝi montras sin per la decida volo plivalorigi la vivon. Tiu nefleksebla volo vidigas, ke la arto por vivi ne estas la teren-premado al aliaj homoj, sed ke vera arto estas kreo por leviĝo.

K-do Ekster diras en sia klarigo al la amsterdama magistrato: "Kiom povos elkreski tiaj centroj, se ili trovos imitadon ankaŭ en aliaj mond-urboj, ĝis veraj kultur-centroj, kiuj per siaj interŝanĝoj de teatro-trupoj, muzikistoj, ekspozicioj ktp. povos konduki la popolojn en la plejan profundon de ilia ekzisto, kaj la unu al la aliaj!"

"Tial, li diras ĉe la fino de sia klarigo," mi havas la konvinkon, ke tia centro nur povos esti fondata p e r kaj p o r la komuneco, por kiu ĝi ekzistos. Ĝi nepre ne povos esti dependa de la laŭplaĉo de kelkaj kapitalistoj. Ne; ĝi devas esti fondota sub la gvidado de la estro komunuma, en ĉi tiu okazo de la magistrato de Amsterdamo."

La projekto de la konstruo estas farita tiele: Tuj post la enirejo estas projektita granda halo, de kie oni povas iri al la teatro, koncertsalono kaj al la ekspozici-salonoj. Du monumentaj ŝtuparoj kondukas nin ĉu al la teatro, ĉu al la koncertsalono. La ekspozici-salonegoj, kiuj lokiĝas teretaĝe, estas interligitaj per larĝa galerio por statuoj. En tiu ĉi galerio troviĝos ankaŭ la akceptejo. La ekspozici-salonegoj formas la du alojn[1] de la konstruo, kiuj estos konstruitaj ĉirkaŭ intima ĝardeno. La malantaŭa flanko estos uzita por konstrui salonegon, kiu ligite kun la ekspozici-salonegoj estos uzebla kiel publika vendejo. Krom tio oni ankaŭ projektis en ĝi kunvenejojn ktp. La tuta konstruo estas projektita de arkitekto Jan de Mejer.

En la buĝeto estas projektita, ke anoj (la kotizo estos 15 guldenoj = 6 dolaroj jare) povos viziti ĉiumonate unu teatran prezentadon, unu koncerton kaj ĉiujn ekspoziciojn, paroladojn ktp. Ĉi tiu projekto donas, laŭplane, la eblecon, liveri al ĉiu la plej bonon, por kio tiuj laboras, kiuj amas la arton, sen kiu ĉiu homo sentus sin malplena kaj malkontenta.

Mi nun ankoraŭ menciu, ke K-do Ekster ne nur esperas akiri plibonigon de la esprim-lingvo en la arto, tiel ke ĉiu ĝin povos kompreni, sed, krom tio, ankaŭ intencas profiti la utilon de esperanto, la lingvo, en kiu ĉiuj popoloj povas interkompreniĝi. Tio rajtigas min fini per la deziro: "Bonan sukceson, K-do!"

A. V e e n (13606)

KOREKTO

En n-o 269 de "S-ulo", artikolo pri Murmansk, troviĝas interalie noto, ke samovaro estas rusa forno. En eksterlando samovaro estas apenaŭ konata; tial niaj K-doj ricevas strangan impreson, se ili opinias, ke ĝi estas ia forno k foje aŭdas, ke ĝi estas starigata sur la tablon. — Samovaro ne estas rusa forno (tia estas granda bakforno uzata de la rusoj por baki k kuiri), sed ujo, en kiu oni boligas teakvon. Ĝi estas de tre varia grando k ludas inter la doma ilaro tieldire la plej gravan rolon. La rusoj ŝatas teon trinki je iu ajn tempo de la tago k ĉiam por tio oni preparas la samovaron, kiun oni kun bolanta akvo portas sur la tablon. Ne estas imagebla gastigo sen samovaro.

Do niaj eksterlandaj Gek-doj ne ektimu, legante, ke la vetkurinta fraŭlino ricevis "rusan fornon", sed imagu belforman, nikelumitan vazon, kiu estas la fiero de ĉiu ruso. *V. M. 1311.*

[1] Flankojn.

SENNACIULA JUNULARA PAĜO

Sub kontrolo de Junulara Sekcio de SAT. — Redakcia adreso: A. SCHWARZ, Lerchenstrasse 14, Neckarsulm (Germ.)

DIMANĈA MATENO

Matena krepusko kuŝas ankoraŭ super la urbo, kiam mi kun plenigita dorsosako, enhavanta manĝprovizon por tuttaga migrado, forlasas mian loĝejon kaj direktas miajn paŝojn al la stacidomo. De tie veturigos min vagonaro el la granda urbo en la belan, freŝan arbaron, al verdaj, florkovritaj herbejoj kaj maturiĝantaj frukt-kampoj. Kvazaŭ preĝejtrankvilaj estas ankoraŭ la grandaj, larĝaj stratoj, kie alitempe furiozas la grandurba trafiko. Estas tiel trankvile, ke oni en distanco de kelkdek metroj jam povas aŭdi la paŝojn de ia alia pasanto. Malmultaj homoj nur estas videblaj, la urbo ankoraŭ dormas.

Je difinita loko atendas min kelkaj geamikoj de l' laborista junularo kaj intersalutinte nin per "Amikeco"[1], ni nun komune iras la ceteran vojon. Survoje ni ankaŭ devas preteriri restoracion, kaj tie ĉi ni vidas tre abomenan, naŭzan scenon. Antaŭ la pordo de tiu ĉi "gastejo" kuŝas en la malpuraĵo kaj koto de l' strato viro, tute ebria. Laŭ ekstera aspekto li apartenas al la laborista klaso. Siaj vestaĵoj estas tute malpurigitaj per vomaĵoj kaj stratpolvo, lia ĉapelo kuŝas dispremite sur la reloj de l' tramo kaj liaj kolumo kaj kravato pendas kiel ĉifonoj ĉirkaŭ la kolo. Proksime de li estas tia sveniga fiodoro de alkoholaĵoj kaj tabakfumo, ke oni ne longe povas resti en lia proksimo. "Bedaŭrinda, kompatinda viktimo de l' alkoholo", ni ekpensas, provante veki lin, sed vane. Ŝajnas al ni, ke li estas senkonscia, kaj ĉar ni ne povas helpi al li, ni decidas preteriri. Unu K-do alportas lian ĉapelon kaj pluen irante ni survoje atentigas policiston pri li, por ke li igu lin forporti.

"Ĉu tio ne estas tre instrua travivaĵo?", mi demandis miajn amikojn. "Ĝi estas ekspluat-maniero en malgranda skalo. La laboristo, havante monon, estas konvena al la restoracíposedanto. Mono ja ne fiodoras![2] Sed poste, kiam la laboristo estis elspezinta sian monon, kiun li devis akiri dum peza, streĉa, laciga laboro en fabriko aŭ kontoro, la "nobla gastiganto" (gastejestro) ne plu volas havi ion komunan kun li. Li ricevas puŝon, estas forpelata el la "gastejo", kaj kuŝas sur la strato, sen helpo, sen konscio, ebria, kun malplenaj poŝoj! Same agas la kapitalismo en pli granda skalo rilate al la homa laborforto. La laboristo, kiu disponas ankoraŭ pri sia plena laborforto, estas ŝatata, ĉar li estas tre bona ekspluatato. Sed kiam li maljuniĝas kaj pro tio ne plu povas tiom multe produkti, kiom juna laboristo, li, same kiel tiu ebria laboristo ricevas senkompate forpelan puŝon, kaj li vidu mem, kiel plue vivi. Ĉiam pripensu tion, karaj amikoj, evitu la alkoholon, por ne esti same ekspluatotaj kiel tiu laboristo."

"Kiam mi vidas tiajn scenojn", diris alia K-do, "mia koro sangas pro la manko de klaskonscio ĉe ankoraŭ multege da laboristoj. Mia opinio estas, ke vere klaskonscia, revoluciema laboristo ne ebriiĝas sin, ĉar li ja dum ebria stato ne klare povas pensi. La lab. movado bezonas sobrajn, pensemajn kapojn! Plie mi opinias, ke tiaj agoj estas plene kontraŭsocialistaj! La socialismo alcelas, kiel ni ĉiuj scias, la komunan vivon. La plej bonan ekzemplon ni ja havas en nia junulara asocio. Sed kiam laboristo bezonas tiom da mono por siaj propraj postuloj, por kontentigo de pasiaĉo, tiam li lasas malsati sian edzinon, siajn infanojn. Dum li diboĉas kaj drinkas, lia familio suferas malsaton kaj kelkfoje ne posedas la plej neceson por komfortete vivi. Li sekve estas egoisto, nekomunulo kaj ankaŭ ne vera, sincera, tute konvinkita socialisto."

"Vidante tiajn bildojn", juna K-dino parolas, "mi ĉiam denove ĝojegas, ke mi kaj vi, amikoj, kaj kun ni la tuta socialista junularmovado konsciiĝis, ke vivo sen alkoholaĵoj estas pli bona, pli bela, pli kulturplena. Por la mono, kiun aliaj homoj elspezas por alkoholaĵoj, ni povas aĉeti al ni bonajn librojn, ni povas viziti klerigajn teatrojn aŭ ni povas entrepreni, kiel hodiaŭ, migradon en la belan, vastan kamparon. Kiel bele estas, legi la verkojn de niaj laboristaj poetoj aŭ enpenetri la regionojn de l' scienco kaj arto, kiel edifa estas bona teatraĵo aŭ koncerto! Mi tute ne povus imagi, ke mi iam povus forturni min de tia vivo, kiun mi nuntempe vivas. Mi sincere bedaŭras la kompatindajn edzinojn de tiaj drinkemuloj. Ilia vivo ne estas ĝojo, sur ilia vivovojo ne brilas la suno; sed ĉiama estas ĉagreno, zorgo, turmento! Pro tio mi ankaŭ plue volas esti varbanto, por ke almenaŭ la nova generacio estu sobra, pensema! Ni volas rakonti al la junaj homoj pri malutilo de l' alkoholo, ni volas montri al ili nian vivon, nian laboron por la bono de l' lab. movado, kaj mi certe kredas, ke iam venos la tago, kiam ĉiuj homoj estos liberaj kaj ĝojplenaj!" — — —

Tiel parolante ni atingas la stacidomon, kie jam regas vigla vivo. Multaj grupoj da migremuloj rapidas al la vagonaro, por veturi en la arbaron kaj travivi tie kelkajn trankvilajn horojn. Vidante tion reaperas mia ĝojo, kiu malaperis, kiam mi vidis la ĵus priskribitan, instruan, neforgeseblan scenon. *Riedel (14 981), Giessen.*

[1] Saluto de l' germ. soc. lab. junularo kaj infanamikoj.

[2] Germ. proverbo.

GEKAMARADOJ, AKTIVIĜU!

La laborista junularo en Sovetio serĉas rimedojn por kunligiĝi kun junularo de l' tutmondo. Kreskas la kulturaj postuloj de l' junularo, kreskas la intereso konatiĝi kun moraro de fremdaj landoj kaj pli ofte aperas la deziro rakonti pri ili mem. Movado por la larĝa disvastigo de eksterlandaj lingvoj inter laborista junularo fiaskas. Nek eblon, nek tempon havas la junularo por sin speciale okupi pri la ellernado de iu nacia lingvo. La sociaj ŝarĝoj forprenas multe da tempo. Pri la bonutilo de internacia lingvo kiel ilo por interkorespondado jam konvinkiĝis preskaŭ ĉiuj. Kreskas la nombro da esp-istoj, kreskas esp-aj rondetoj. La plej bonaj agitantoj estas la faktoj. Nenio pli bone agitas por esp-o ol letero enpresita en loka ĵurnalo aŭ laŭtlegita dum kunveno. En nia regiono antaŭ tri jaroj ne estis eĉ unu esp-isto; nun estas pli ol dudek. Por fari pli profitdonan laboron, ni organizis ĉe regionkomitato de komjunularo taĉmenton ("brigado") de internaciaj interliguloj, kiu konsistas nur el esp-istoj. La ĉefa tasko de l' taĉmento estas viziti fabrikojn kaj metiejojn, dum junularkunvenoj doni informojn pri internacia interligo, tralegi leterojn. Al 10-a jubileo de KJI estis eldonita broŝureto pri nia sperto; pasis malmulte da tempo, sed la rezulto jam estas sentebla: ĉiutage en regionkomitaton venas K-doj, kiuj serĉas esp-istojn, gvidantojn por rondetoj. Unu junulo el "labkoro" de urba gazeto, trarigardante la broŝureton, diris: "Nur nun mi komprenas, kiel povas esti utila esp-o en internacia edukado."

Novaj leteroj kaj novaj petoj... Estas danĝero, ke la regiona "brigado" ne povos kontentigi junular-kolektivojn. Jam kelkajn tradukitajn leterojn ni ne scias kien sendi — mankas adresoj. Malgraŭ du anoncoj en "S-ulo" kaj multaj leteroj laŭ Jarlibraj adresoj la rezultoj estas plorindaj. Laŭ anoncoj estis ricevita nur *unu* letero. En nuna situacio ni ne povas paroli pri sukceso de nia laboro en ĉiu ĉelo de nia regiono, malgraŭ ke la subteno de l' komjunulara komitato kaj junularamaso estas granda, same kiel la simpatio al nia movado.

Ni multe batalas por la kompreno de l' gravo de esp-o. Nun en tre bonaj cirkonstancoj ni elpaŝas, esperante

DISKUTEJO

Ĉu animisma, ĉu scienca fazo?

Mire mi legis en n-o 271 de "S-ulo" la artikolon "Inter Ni", en kiu K-do E. L. diras jene: "celas instigi la SAT-anojn, ke ili penu ĉiurilate forliberiĝi el la animisma k religia fazoj k atingi la sciencan, kie oni ne rilatas al siaj deziroj kiel al tujaj efektivigeblaĵoj." Tion mi ne konsentas. Kion do ni SAT-anoj tiel profitus? Nur en la animisma fazo la homo estas krea!

Per tri ekzemploj mi penu pruvi mian aserton. Ĉiu mem povas multobligi similajn ekzemplojn. Kiam Johano Eriksson konstruis la unuan helicon, per kiu li volis antaŭenmovi la ŝipojn, tiam la sciencistoj pruvis formule, ke tio estas sensencaĵo... Kiam estis konstruata la unua elfera ŝipo, tiam la sciencistoj frape pruvis, ke tio estas neeblaĵo, ĉar, tiel ili argumentis per sciencaj formuloj, la metalo ja estas multoble pli peza ol la akvo, do elfera ŝipo tuj devas droni...

Le *kreantoj* fidis al sia produktopovo. Ne "necesas" malnova kredo je ĉiopoveco. Spinoza foje skribis en sia Etiko: "La homo faras tion, kion li volas, tion, kion li ne volas (deziregas) li neniam *povas* fari. Do ŝajnas, ke la volo krei ion (kio ne jam ekzistas, aŭ kio jam estas, sed pri kies esto la kreonto nenion scias) devas esti animisma. Religia ĝi ne povas esti ĉi-okaze Ke ĝi estas scienca, mi forte pridubas konsiderante la internacian lingvon. Kiam la knabo Zamenhof diris al si: "Kiam mi estos plenkreska, tiam mi kreos lingvon...!", tiam li estis en animisma fazo. Li kredis al la ĉiopovo de plenkreskinto, almenaŭ tiel, ke plenkreskinto povas ĉion ĉi tion fari, kion li volas (Spinoza!). Kaj en tiu animisma fazo, kredo al povo, li edukis sin mem al produktopovo.

Mi certe estas en animisma fazo, ĉar mi kredas ("kredas" ne bone esprimas la ideon), ke revolucio estas ebla. Ĝis nun mi jam ne legis sciencan *pruv*disertacion pri la eblo de revolucio, kies ideon mi komprenas *ne nur* en la ŝanĝo de la ŝtatformo, sed ĉefe en la ŝanĝo de *nia etika koncepto*.

Tujaj efektivigeblaĵoj... Lingvaj sciencistoj okupis sin dum jarcentoj pri la problemo — k la rezulto? Aliaj sciencistoj *eble* povus sin samdaŭre okupi.

Simpla rimarkigo. — Ĉe la menciita artikolo mi atentigis la legantojn per piedpaĝa noto, ke la sencon de *animismo* oni devas kompreni laŭ tiu, kiun donas al ĝi la angla-lingva aŭtoro Tylor en sia verko *La Primitiva Kulturo.* Estas evidente, ke K-do 10 580 komprenas aliel la sencon de l' vorto. Mi neniel celas kontraŭbatali la entuziasmon. Ĝi ja estas la instigilo de niaj agoj; ĝi estas kvazaŭ la motoro de la homa maŝino; sed mi restas ĉe la konvinko, ke la malvarma racio devas sidi ĉe la direktilo. Vole nevole la kreantoj, la inventantoj devas stari sur *scienca* bazo: ne per preĝoj, per minacoj, krioj k ordonoj ili sukcesis en siaj eltrovoj, sed nur obeante fizikajn leĝojn. Se en niaj kongresoj oni krias: Vivu SAT! kun la nura celo plifortigi nian entuziasmon, nu, bone! Sed, se oni kredus, ke tiaj krioj fakte antaŭen puŝas nian movadon, tio estus malbona. Kaj mi nemalofte rimarkis, ke la kriemuloj ne ĉiam estas aguloj, efektivigantoj...

Per mia artikoleto mi ankaŭ celis atentigi, ke parolo aŭ skribo povas aspekti tre "revolucie" k fakte esti *esence* reakcia...

Sed mi plene konscias, ke mia skribmaniero devas kaŭzi ĉe multaj legantoj malbonan impreson. Se mi parolus laŭdeme, estus certe pli plaĉe al la plimulto. Kiam iu kviete dormetas, se vi per puŝo vekas lin, ne atendu dankon. Kaj mi celas maldormigi la intelekton de la SAT-anoj. Sekvel... *E. L.*

Kiel rilati al militservo?

Mi kelkfoje legis en "S-ulo" artikolojn, kies verkintoj tre fieras pri evito aŭ fuŝplenumo de militservo, por tiu celo eĉ intence ruinigante sian sanon, kripligante korpon, por fariĝi netaŭgaj je servo. Traleginte tiajn artikolojn mi priesploris la procedon de l' K-doj k trovis ilian konduton malprudenta. Mi prijuĝis ilin tro dorlotitaj, malbravaj k iom spiritomalsanaj, ĉar aspektas nenormale (aŭ religieme) sin turmenti nur tial por liberiĝi el militservo. Eĉ dummilite (ĉi tie temas pri pacotempo) mi havas nur grandan indignon k malestimon kontraŭ tiaj homoj, ĉar ni ja tro ofte malsanigas nin senkonscie: oni neniam devus fari tion konscie. Se oni demandus, al kiu aŭ kio ili utilis per tio? ĉu al laboristaro? ĉu al si mem? Eble al SAT? — Al neniu k nenio! Ili nur preparis el si kandidatojn por punlaborejo k malsanulejo.

Estas nerefuteble, ke granda plimulto da junuloj en aĝo pormilitserva estas indiferenta aŭ malkonscia je klasbatalo. Ili dum servo ofte havas tian konvinkon, kian iliaj estroj. Tial, se inter rekrutoj troviĝas klaskonsciaj K-doj, ilia devo ne estas sin kripligi aŭ forkuri, sed resti inter siaj pli malprogresemaj K-doj, por montri al ili bonajn ekzemplojn per sia modela konduto kamaradeca, reteni ilin de malhonoraj intencoj, eduki ilin.

Kvankam mi devis servon komenci dum ĥaosa milittempo (1919), mi tute ne bedaŭras tiun tempon, ĉar mi tiam grave plilarĝigis mian mondkoncepton. Dank' al ĝi mi konatiĝis kun plej bonaj, plej sindonemaj K-doj, kiajn en privata vivo mi vane serĉus; sen ĝi mi eble nek estus socialisto, nek esp-isto. Tamen mia servo distingiĝis iel de tiu de aliaj proletoj, ĉar ĉiuj militistoj havis difinitan celon por batali, nome, forpeli el la lando diversajn internaciajn ekspluatemajn bandojn, naive opiniante, ke post milito ja ĉio estos aranĝata plej modele. Tial ni neniam plendis pri malfaciloj, estis ĉiam gajaj eĉ se ni devis nudpiede marŝi sur frostiĝinta tero. Gardostarante mi kovris la piedojn per ĉapo. Mi deziris esti pli lerta k ne esti gvidata de iu ajn; tiucele mi eniris suboficiran kurson. K-doj servontaj! Ne timu — ju pli diligentaj vi estos, des pli facila ŝajnos la servo. Hardu vian korpon per gimnastikado k ekzercoj; alproprigu ĉiujn militosciojn; eble per tio vi iam povos utili al la proleta movado. Estas dezirinde, ke en la kadrojn de militestraroedukistaro penetru pli k pli da progresemaj elementoj: ju pli militestraro estos progresema, des malpli multe kapitalistoj k imperialistoj havos soldataron je sia dispono.

Kiu depost sia infanaĝo suferis pro malsato k senhonta ekspluatado de la mastroj, sentos militservon nur kiel vivoŝanĝon portempan. En nia roto estis junulo spirite k korpe tre malforta, analfabeto. Dum ekzercoj li ĉiutage ploris, sed posttagmeze ridetante li foriris regimentan lernejon. Post kelkaj semajnoj li jam lerte legis k kalkulis. Demandite, kie li sentas sin pli feliĉa, ĉu ĉi tie aŭ ĉe mastro, li senŝancele respondis: "Ĉi tie ja estas pli bone." Verŝajne li ekkomprenis sian neeviindan staton.

K. K., Latvio.

Noto: K-do Barmin (14663), Sovetio, forte atakita de K-do 641 en n-o 270 pro sia artikolo pri nudismo, esprimas sian indignon pri tiu rebato. Li konfesas, ke skribante sian artikolon li ne konis ion pri disvolviĝo de nudkultura movado en Germanio. Li esperas, ke K-do 641 leginte liajn vortojn pri "sparta eduko" (n-o 271) ŝanĝos sian opinion pri li k reprenos siajn malĝentilajn vortojn. Li diras, ke li tute ne estas tia mezepokano, kia lin pentris K-do 641.

K-do A. S. (10 580), Germ., sendis post diskutfermo artikolon pri vegetarismo, el kiu ni notu nur, ke kvankam mem vegetare vivanta, li trovas naive aserti, ke vegetarano havas pli noblan senton k komprenon rilate al kreaĵoj. Konsekvenca apliko de veg. ideo kon-

---

renkonti grandan korespondemon. Ĉiu esp-isto fariĝu peranto por sia fabriko, sia junulara grupo. La lab. kolektivoj, la sportgrupoj, komjunulaj ĉelo el via urbo nur per via helpo povas kunligiĝi kun sovetia K-daro. For la individua korespondo — por la kolektiva! Nur per tio tutmonda junularo helpos al plua disvastiĝo de esp-o en proleta lando. *Sz. Carovskij, Kiev.*


NIA POŜTO

14 981. — "Migra tago de soc. jun." aperos.

Postl, Vieno. "Ni kantu" sendita al "S-ulo" por "Diskutejo".

K. D. 10 742. — "Ĉirkaŭ la rajtigilo" transsendita por "Diskutejo". Bonvolu ĝuste afranki.

La adreso de l' Sekciestro dum tempo de 15. jan. ĝis 15. junio 1930 estas: D. Keuning, Heimvolkshochschule, *Leipzig S 3,* Prinz-Eugen-Str. 34.



N-o 15 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 9. Januaro 1930

PRI BLANKAJ LANDOJ

Statistiko de la "IRH" pri blanka teroro

(Esperanto-Servo.) Ekzekutiva Komitato de la Internacia Ruĝa Helpo finaranĝis statistikon pri viktimoj de blanka teroro k burĝa klas-juĝo dum januaro-septembro 1929. Laŭ nekompletaj informoj, plej parte ĉerpitaj el burĝa gazetaro, en 62 kapitalistaj, koloniaj k duon-koloniaj landoj, dum menciitaj 9 monatoj estis mortigitaj 89 033 k vunditaj 26 665 revoluciaj laboristoj k kampuloj; arestitaj estas 62 228 personoj; malpermesitaj estas 981 organizoj; malpermesitaj k konfiskitaj estas 350 gazetoj k ĵurnaloj. En la samaj landoj okazis 1140 politikaj procesoj, dum kiuj oni kondamnis 6478 revoluciulojn. El ili estas kondamnitaj al morto 2153, al malliberejo dum tuta vivo 48 Gek-doj; aliaj estis kondamnitaj al 7359 jaroj da malliberejo, ekzilo k 68 000 dolaroj da monpuno. Laŭ kruel-agoj de blanka teroro unuan lokon okupas Ĉinio, poste estas Hindio, Italio, Jugoslavio, Palestino k franca Kongo. Laŭ nombro de politikaj procesoj la unuan lokon okupas Francio, Polio, Ĉinio, Jugoslavio, Rumanio. Dum la sama periodo en burĝaj malliberejoj okazis 74 malsatstrikoj, partoprenitaj de 5328 personoj, kiuj malsatadis entute 30 081 tagojn. La nombro de malsatstrikoj k partoprenintoj estas la plej granda en Bulgario, Polio, Rumanio, Latvio k Litovio. — La tuta nombro da malliberigitoj dum novembro estis 68 136

Kompil-tradukis: *Pavilionov, Sebastopol.*

EL URUGVAJO

Manifestacioj antaŭ parlamento

(Esperanto-Servo.) La 30-an de novembro estis granda manifestacio kontraŭ la "Comite de Vigliancia Economica" (Ekonomia Landdefendo). Tiu organizo per ĉiuj fortoj agadas kontraŭ la pensio-leĝo, ĉar tiu leĝo helpas kriplulojn k maljunajn laboristojn. Krome tiu organizo celas malaltigi la salajrojn de la laboristaro, nun, kiam ĉiuj vivbezonaĵoj pli-kariĝas. La manifestacio kontraŭ tiuj intencoj sukcesis. Kunvenis miloj da laboristoj antaŭ la parlamento en Montevideo, kie K-do Gomey (komunista parlament-deputito) raportis pri la agado de la "Comite de Vigliancia Economica". La laboristaro unuanime decidis, per ĉiuj rimedoj kontraŭbatali tiujn intencojn. — La 9-an de decembro denove estis manifestacio antaŭ la parlamento kontraŭ la "Comite de Vigliancia Economica". Sed tiun manifestacion ĉevalrajdantaj policistoj (kozakoj) per glavoj furioze disbatis. Kelkaj laboristoj estis arestitaj k unu grave vundita. Nun la proletaro en Urugvajo ekvidis, kia libereco estas en ilia "demokrata" ŝtato. Tiu "kozak"-atako instruas ilin por la revolucio.

13 827, Montevideo.

EL ARGENTINO

Strikantoj kontraŭstaris policistojn

(Esperanto-Servo.) En San Francisko (Provinco Corđoba) ĉe firmao Boero & Tampieri ekstrikis la laboristoj. La striko jam daŭradas pli longan tempon. La magistrato kun helpo de policistaro venigis strikrompantojn de la "Liga Patriotica". La policistaro malpermesis al la strikantoj ĉian kunvenon. Spite tio la strikantoj kunvenis, policistoj atakis — pafante inter la amason. K-do Rivadero Lisandro k junlaboristino Hermina Beregas estis mortpafitaj, K-doj Ernesto Gallego k Antonio Gaŭna grave vunditaj. La laboristaro tuj reatakis k disbatis la policistojn; du policistoj estis mortigitaj, unu vundita. Kompreneble la kapitalistaro tuj vokis la militistojn. Oni nun provas pruvi, ke la strikantoj komencis la atakon. La argentina proletaro atendas novajn atakojn k estas preparita por rebato . . .

13 827, Montevideo.

EL NEDERLANDO

Eklezio — lig-ano de l' kapitalistaro

(Esperanto-Servo.) Laboristoj de fabriko en Mastricht, kie oni produktas blankan zinkofarbon, strikis por pli-bonigi sian vivstaton. Policanoj protektis strikrompantojn k forpelis la strikantojn. Tiel bone oni plenumis tiun taskon, ke strikanto estis mortpafita. Katolikaj demokratoj kune kun la aliaj laboristoj persistis en la striko, k jam estis la venko tre proksime, kiam la katolika eklezio fine helpis . . . Kiel ligano de la kapitalista klaso "sia pastra moŝto" ordonis al la demokrataj anoj de la eklezio, rekomenci la laboron . . . k la sklavoj de la eklezio obeis. La laboristaro en Mastricht estas denove katenita en mizero.

Ariadno, Zeist.

EL BRITIO

"Feino-pavo" subaĉetas laboristojn

(Esperanto-Servo.) Vidvino de milionulo, "feino-pavo" Ledi Haŭstun (Lady Houston) deklaris mon-militon kontraŭ la urb-estraro de urbo Hull. Ŝi minacis "pagi la salajrojn al 115 tramistoj, se la urbestraro maldungos ilin"; ŝi krome minacis per "laŭleĝa proceso" kontraŭ la ministrino por laboro. Kio estas la kaŭzo por la "oferemo" de tiu milionulino? En jaro 1926, dum la granda ĝenerala striko, koncernaj 115 tramistoj perfidis siajn laborfratojn, laborante kiel strikrompantoj k tiel plej aktive helpante al la malamikoj de l' laboristoj. (Ledi Haŭstun ne povus pagi la salajrojn al 115 tramistoj, se ŝi mem estus "nur" tramistino.) Ŝi tamen bone scias, kial ŝi tiel "bonvoleme" helpas al 115 perfidintaj tramistoj, dume milionoj da senlaboruloj treege suferas . . .

14 586, Stone-Rhyl.

EL GERMANIO

Burĝa moralo k leĝaro

(Esperanto-Servo.) Poŝt - oficistino germana estas punita "laŭ disciplina leĝo", ĉar ŝi kunvivis kun viro sen beno de eklezio k ŝtato. Ŝi estis bona oficistino k kolegino, sed nun subite ŝi estas punata. Kial ŝi estis "edzino sen leĝa beno"? Ĉar ŝi amis tiun viron; ĉar la ŝtata leĝo ne konsentis al malligiĝo de ŝia unua edzo, de tiu viro kun alia "laŭleĝa" edzino. Por ke la regna "disciplin-juĝistaro" havu bazon por sia juĝo, estis necese, ke la koleginoj de la oficistino "malaprobu tian malmoralan konduton". Kaj, por resti en la ofico, por esti regno-fidelaj oficistinoj, la koleginoj memkompreneble "malaprobis tian konduton". Fariĝas tempo, forpeli tiun burĝan, sklavigan k kontraŭnaturan leĝaron . . .

1851, Ŝvajdnic.

---

dukus al ekstremo: oni devus protesti kontraŭ forbuĉo de betuloj (por harbalzamo), leontodoj (por salato), ekspluato de abelujoj (vegetarismo "akrigas" la senton por justo?!).

RESPONDA PARTO

El "ceteraj" landoj k regionoj ni "vane" atendas raportojn! (?). "Ceteraj" landoj k regionoj estas tiuj, el kiuj ĝis nun ni ne ricevis raportojn, do ne povis presigi ion . . .

Sovetianoj. En sekv. n-o ni presigos denove kelkajn el viaj raportoj. Sendu nur raportojn pri okazintaĵoj k aferoj, kiuj sufiĉe interesas ankaŭ nesovetianojn . . .

Ariadno. Kunsendita skizo estas bonega; sed ni ne povas enmeti — bedaŭrinde.

15-a listo de raportoj en jaro 1929/30

97. Statistiko de la "IRH" pri blanka teroro. Kompil-tradukis: Pavilionov-Sebastopol (Sovetio).
98. Manifestacioj antaŭ parlamento. 13 827, Montevideo (Urugvajo).
99. Strikantoj kontraŭstaris policistojn. 13 827, Montevideo (pri Argentino).
100. Eklezio — lig-ano de l' kapitalistaro. Ariadno, Zeist (Nederlando).
101. "Feino-pavo" subaĉetas laboristojn. 14586, Stone-Rhyl (Anglio).
102. Burĝa moralo k leĝaro. 1851, Ŝvajdnic (Germanio).

TRA ESPERANTIO

Atentu spiriton, ne sole literon de Fundamento!

Koro doloras, kiam mi pensas pri torento da novaj vortoj, kiuj sub pre teksto de sia "internacieco" invadas k malordigas nian vortaron, sed kiuj fakte estas nur derivaĵoj. Nia vortaro pli k pli pufiĝas k rompiĝas gramatika k lingva unueco. Ekz. estas uzataj la vortoj: kooperacio, kooperativo k koopero, demonstracio, demonstro k simpla k laŭfundamenta demontro. Evidente estus tute sufiĉaj nur *koopero k de+montro*. Ĉiuj ceteraj povus esti derivitaj per reguloj de esp gramatiko, se niaj vortaristoj ne perdus lingvan senton k agus nur ete laŭ spirito, ne sole laŭ litero de Fundamento. — Por senbalastigi k ordigi la vortarojn, estus bezonaj neniaj reformoj. Estas bezonaj nur senbara *evoluo* de esp. k *disvolviĝo de interna tekniko,* kiu ĝis nun estas apenaŭ tuŝita. La vortaristoj devas havi nur ioman lingvosenton k ne esti sole simplaj registrantoj de bezonaj k senbezonaj vortoj hazarde uzitaj de niaj vicanoj. Ekzistas multaj, kiuj tre aplombe babilas pri "lingva disciplino", sed fakte montris sin nur kiel tre danĝeraj naciigistoj de Zamenhofa vortaro. Ekz. ili tute ne estas ĝenataj de la naciaj, regulrompantaj k tute ne fundamentaj formoj *iluminacio, internacionala, racionala* anstataŭ la zamenhofaj *ilumino, internacia, racia* (ilin ne indignigas eĉ la monstraj *demonstro, ekzekutivo!*).

Oni povus facile atingi ordon k simpligon de vortfarado, se oni uzus kiel sufiksojn *-al, i-* k *-oz*: la unua estas ordinara dativa vorteto uzota kiel sufikso, la dua montras ne sole *landon*, sed ankaŭ *sciencon, fakon* aŭ *okupon*, la tria montras *riĉa de . . .* Tiam la longa serio da nunaj radikoj subite ricevus etimologian sencon k iĝus ne radikoj, sed laŭregulaj derivaĵoj. Jen estas parto el ili: norm+al+a[1] (rilatanta *al* normo), radik+al+a, origin+al+a, univers+al+a, ide+al+a. form+al+a (rilatanta *al* formo), sign+al+a, horizont+al+a (rilatanta *al* horizonto, sed ne horizonta!), moment+al+a, ofici+al+a, diferenci+alo, imperi+al+isto, internaci+al+ismo (ĉi-vorto tute laŭfundamente povas kontentigi naciemajn regulrompulojn, kiuj ŝatas la formon internacionala), dekon+al+a k centon+al+a (anstataŭ indignigaj *decimala, centezimala*), centr+al+a . . . La vortoj kun sufikso *-i en senco de scienco, fako aŭ okupo* (ĉi-larĝan signifon mi proponis en jaro 1923[1] estas ankoraŭ pli multaj: astronom+io, zoolog+io, arĥitekt+io, ministr+io, telefon+io (okupoj aŭ fakoj de astronomo, zoologo, arĥitekto, ministro, telefono ktp.). Kun ĉi-sufikso ricevas etimologian sencon la vortoj similaj al la jenaj: koleg+io, konfes+io, fil+io . . . Rilate al la sufiksoj *-al* k *-i* mi proponas nenion krom kompreni k apliki ilian faktan signifon!

La sufikso -oz (jam antaŭlonge uzata) etimologie sencigas la vortojn, kiuj ĝis enkonduko de ĉi-sufikso estis radikoj: furi+oza, graci+oza, ofici+oza (analoga al ofici+ala), grandi+oza . . . La vortoj *milit+ar+ismo, element+ar+a* okaze ne estas regulrompantaj, sed la vorto *familiara* estas etimologie alisenca k superflua, ĉar ekzistas la laŭorda *familieca.* Pro postuloj de sama ordo la vortojn *inkluzive,* ekskluzive oni povus anstataŭi per la pli laŭordaj *enklude, eksklude, eĉ elklude* (kiel *konklude*) . . . Ne estus peko plivastigi uzon de finiĝo -es (el la vortoj kies, ties), kiu donos al substantivoj k adjektivoj signifon de *dativo de posedo* (kies, ties, ĉies, ies nenies, alies ktp.) . . .

Post enkonduko de l' sufikso -iv la vortoj *iniciativo, konservativa* okaze iĝis ne regulrompantaj (kvankam pli bonaj estus iniciato konserv+em+iva), sed la tute nefundamenta *ekzekut+iva* (kapabla ekzekuti?) devas esti nepre anstataŭita per la derivita *plenumkomitato* (aŭ mallonge *plenumkom*'). La vortoj demonstracio, kooperacio, kooperativo, ekspozicio, klasifikacio, kvalifikacio, manifestacio, administracio estas senerdaj k tre neoportunaj. Ili malhelpas derivadon. Sufiĉas nur solaj radikoj *de+montr, kooper, ekspoz, klas, kvalit, manifest, administr.* Ili povas doni ĉiujn necesajn derivojn: demontro, protestdemontro, politikdemontro, filmdemontro, demontriro (kiel soleniro, triumfiro, funebriro, tramiro ktp.); kooperejo, kooperasocio, koopermagazeno, kooperbutiko, koopermovado, eĉ kooperio (anstataŭ pli simpla k sufiĉa *koopero*); ekspozo (kiel *civilizo* anstataŭ *civilizacio),* ekspozejo, ekspozaĵo, korespondekspozo, motorekspozo, frukteksposejo (anstataŭ *ekspozicio de fruktoj)* ktp.; laŭklasigo; kvalitigo; manifesti, manifestado, manifestanto, manifestiĝo . . .

Pli k pli ofte jam uziĝas mallongaj sensufiksaj formoj *bono, belo, riĉo* ktp. anstataŭ la senbezone plenaj formoj *boneco, bonaĵo, beleco, riĉeco, riĉaĵo.* Same oni devas kutimigi uzon de mallonga *ĉi* kun substantivoj anstataŭ la plena formo *tiu-ĉi* (ĉi domo, ĉi homo, ĉi-letere, ĉi-sube ktp.). Senbezonaj estas *decimetro, centimetro, milimetro,* ĉar ekzistas tute laŭordaj k preskaŭ samsonaj *dekonmetro, centonmetro, milonmetro.*

Sufikso -ig estas evidente superflua en la sufiĉe klaraj vortoj: publikita asfaltita, planita, anstataŭita, mallongita, kvalitita (anstataŭ kvalitigita k kvalifikita). — Novaj radikoj estas utilaj nur kiam ili ne estas superfluaj. Ekz. estas utilaj *urĝa, brasi (velon),* sed *bredi, brodkasti, pacifismo, feminismo* estas balasto ĉar *bredi* signifas nur kulturi, *brodkasti* — disaŭdigi, pacifismo estas ĝuste pacismo, feminismo estas virinismo. Finante mi devas noti neceson kiel eble esperantigi plej ofte uzatajn proprajn nomojn kiel ĝin faris ĉiuj naciaj lingvoj (Nov-Jorko, Parizo, Moskvo, Monto Blanka, Meztermaro, La Maniko-markolo, Neŭtono k aliaj). Dube "internacia" *Siberio* iĝis regulrompanta, ĉar estas *Novo-Sibirsk* kun akcentata *i* . . .

M. Krjukov.

[1] Kun miro mi konstatas la penon ĉiel silentigi la fakton!

[1] Estas dube, ĉu la alpreno de tiu sufikso simpligus nian lingvon. Por forigi kelkajn radikojn, oni estus alkondukata al tio, ke la sufikso *al* logike sin trudus ĉiufoje, kiam oni volus adjektivigi substantivon. Oni ja devus diri: monat*al*a gazeto, mezepok*al*a arto, patr*al*a amo ktp. ktp. Plua legado de la artikolo naskas en la penso aliajn rimarkojn. Ni diru nur, ke la admonoj de K-do Krjukov pri neceso ne kompliki nian lingvon estas certe atentindaj. Sed necesas ankaŭ ne tro unuflanke vidi la problemon. — E. L

ĜUSTIGI

En "S-ulo" n-o 271 la Ekzekutiva Komitato de la Novjorka SAT-rondo atakis mian artikolon en n-o 263 responde al tiu de K-do Saville en n-o 251. La tono de l' artikolo estas frapa surprizo por mi. Mia senofenda, bonhumora kritiko, per kiu ŝajne ofendiĝis K-do Saville, estis rezulto de mia propra sperto. Fakte, kontraŭe al la deklaro de la Komitato, mi estis ĝis mia forveturo al Eŭropo bonorda membro de nia loka grupo, ĉeestis regule la kunvenojn k pagis kotizojn. Duonfrazoj estas maltrafe cititaj el mia artikolo, sonas ŝiritaj el la kunteksto tute aliel ol la plenaj frazoj. Tia agmaniero de l' komitato tendencas mortigi ĉiun kritikon. *(12 452)*

Publikigante la esencon el longa letero de K-do 12 452, responde al la Novjorka SAT-rondo, ni esperas, ke tio estos la lasta vorto pri la afero. Ĝi cetere havas ĉefe lokan signifon k ni ne povas dediĉi larĝan spacon por tiaj disputetoj.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

BRITIO. Por sia 10-a kongreso la brita kompartio ricevis esp. leterojn el preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj. La plej taŭgaj estos represataj en la parti-organo. La efiko de tiuj leteroj estas tre grava. Je la nomo de la KP de G. B. mi salutas la salutsendintojn pro iliaj interesoj pri la bonstato k sukceso de la Kongreso. (7472.) — *GERMANIO.* 28. 10. 29 vizitis 4 K-doj el Nordhorn (Norda Germ.) la esp. lab. grupon en Enschede (Holando) per bicikloj. Ili trovis en hejmo de K-do de Bruin la grupanojn ĉirkaŭ laŭtparolilo, kiu sendis esp. paroladon de holandaj lab. radio-amatoroj. Post paroladoj de K-doj de Bruin k Pieperit ni estis tre gastame akceptataj de la K-doj, kiuj montris al ni la urbon k manĝigis nin ĉe si (F. Wagner). *Thalheim* (Ercgeb.). La loka lab. esp. grupo sendis petskribon al la lerneja konsilantaro por enkonduko de esp. en nia popollernejo. La lernejkonsilantaro akceptis nian peton, same la urbparlamenta kunsido publika (nur la burĝa frakcio voĉdonis kontraŭ, sed estas kom.-socialista plimulto). Aliaj grupoj imitu! La instruado en lernejo komenciĝos paskon 1930. (8289.) — *POLIO. Bendzin.* 23. nov. ni festis malkovron de Zamenhof-bildo. 120 ĉeestantoj (esp. k neesp-istoj). Parolis div. oratoroj, K-do Ĉeĥovski pri kontraŭmilitaj taskoj. 1. nov. kursmalfermo kun 50 p. (14 220). *Kielce.* La 1. dec. SAT-ano parolis aplaŭdite ĉe malfermo de vesperkursoj nacilingvaj por judaj prof-unuiĝanoj. (15 196).

MEMORNOTO

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Travail, Lyon, 14. 12., *Leipz. Volksztg.,* Leipzig, 11. 12., *Signalen,* Stokh., 12. 12., *"Jul"-n-o de Signalen,* 24. 12. (artik. en esp. de E. Eriksson), *El Socialista,* Madrid, 3. 12., 12. 12., *ITF* bulteno, Amsterd., dec., *De Strijd,* Amsterd., 14. 12., *La Libre Pensée,* Paris, sept/okt. (varbart. de K-do Ŝamar). *El Hombre,* Montevideo, 10. 8., *Lokomotivista gazeto,* Stokholmo, 15. 11., 1. 12. (angulo).

L' Éclaireur, Nice, 1. 12. (pri Pl. Vortaro), 22. 12. (pri Prologo).

Peresper. materialon enpresis:

Le Travailleur Alpin, Grenoble, 7. 12., 14. 12.

Specialan jarfinan n-on eldonis Lab. Esp. Unuiĝo de *Malmö* (Svedio). 8-paĝa. Kun bildoj. Reklamo pri SAT. En *Trelleborg* (Svedio) nia K-do 11 267 eldonis svedl. jarfinan ĵurnalon (1000 ekz.) kun granda, ilustrita artikolo pri la 9-a Kongr. En la jarfina n-o eld. de Senlaborula unuiĝo en *Trelleborg* (1200 ekz.) troviĝas traduko el "La Lernanto".

NIA POŜTO

5418. — Ne pro timo insulti la policistojn, ni mallongigis vian artikolon, sed nur por ne malŝpari lokon per enmeto de senefikaj vortoj. Ne per frazoj vi venkos la policon, eĉ se ili estas plej insultoriĉaj. En via lasta artikolo troviĝas ankaŭ kelkaj drastaj esprimoj, direktitaj ne al policistoj, sed al partianoj, kiujn la rezolucioj de niaj kongresoj malpermesas insulti. Sekve . . . *E. L.*

10 580. — Diskutartikoloj senditaj aperos siavice. La tradukon de la konata libro de L. Frank ne sendu al mi, sed por kontrolo al la Lit. Komisiono (Odeso). *N. B.*

9742. — Via skizo estas enpresota . . . siavice.

6604. — Bedaŭrinde ĝis nun ni ne trovis lokon en nia felietona paĝo, por aperigi vian longan priskribon. Sekve vi devos atendi ankoraŭ . . .

14 506. — Sendu tiajn raportetojn al Esp. Servo. Pri la PPS-arestoj ni cetere jam publikigis raporton siatempe. Simila anekdoto kiel la via jam aperis en "LL" (en iom alia formo).

15 195. — Ni ricevis tro malfrue vian artikolon por enmeti ĉi-jare. Ni gardos la manuskripton. *Red.*

1125. — Kvankam ni ne povas decidi definitive pri akcepto aŭ rifuzo de artikolo antaŭ ol esti ĝin leginta, ni tamen, juĝante laŭ via verkmaniero, povas konsili, ke vi sendu vian manuskripton. La du ricevitaj aperos. *F. L.*

Al kelkaj. — La jarlibron por 1929/30 ni mem nur ricevas meze de januaro el la presejo.

14 390. — Jarkolekto de "S-ulo" de 1. 10. 1928 ĝis 30. 9. 1930 kostas 4 mk. g. Mankas kelkaj n-oj, sed ni klopodos trovi ilin.

6523. — Simpla koresp. anonco kostas 0.80 mk. g. *Adm.*

Novaliĝantoj al SAT devas pagi aliĝkotizon. Vidu n-o 267 de "S-ulo".

K • O • R • E • S • P • O • N • D • A • D • O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,80 mk. g., ĉiu plia linio 0,50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
Ł = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis

AŬSTRIO

Adresŝanĝo. — K-do Louis Angermayer, loĝas nun: *Linz-Kleinmuenchen,* Wr. Reichstr. 222.

BULGARIO

K-do Todor Tereziev, Ŝiv. Rekord, *Nevrokop.* kĉl, krom Sovetio.

K-do Spiro Krestin, *Nevrokop,* kĉl, krom Sovetio.

ĈEĤOSLOVAKIO

K-do Franz Kammerer, *Holeischen, 90 ap. Pilsen,* kĉl, L, PI. Resp. garant.

FINNLANDO

K-do Sulo Kotilainen, Osmonk. 1, ovi 9, *Tampere,* L, PI, kĉl, pri ĉ. temoj. Ankaŭ kun K-dinoj pri amuzaj temoj.

GERMANIO

Kaŭze de mia anonco en n-o 262 mi ric. PI kun bildo: "Kozakoj skribas pamfleton al . . . Mi perdis ĉi PI. Bonvolu reskribi K-do! Adr.: Ricj. Treffkorn, Finkengutweg 37, *Sebnitz i. Sa.*

K-dino M. Wiedemuth, *Niederoderwitz i. Sa.* (22 j.), interŝ. PM, kĉl. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo. — Gek-doj G. k E. Endler petas siajn gekoresp-antojn noti la novan adreson: *Selb (Bavario),* Sommermühlweg 49.

— Hispana K-do (laboristo), dum libertempo lingvolernanto, dez. korespondi kun germana K-dino. Adr.: G. Munoz, Zimmerstr. 84, b. Pfennig, *Berlin SW.*

HISPANIO

K-do Emilio Amaya, str. Jaboneria 2, *Cadiz,* L, PI, kĉl.

K-do Felipe Abril, str. Manuel Rancés 8, *Cadiz,* L, PI, PM, kĉl.

JUGOSLAVIO

K-dino Anke Jamnik, *Trbonje,* ricevis amasegon da PK, por kiuj ŝi tutkore dankas kaj petas pardonon pro neeblo koresp. kun ĉiuj.

NEDERLANDO

— Junkom. grupo koresp. kun div. land-organizoj pri div. temoj. Adr.: Franz Beliĉ, Dahliastraat 4, *Aalsmeer.*

PORTUGALIO

K-do Manoel d'Oliveira Gordo, R. de Campolide 190-2°-E, *Lisboa,* kĉl, PI, bfl, eventuale daŭra koresp-ado. Resp. garantiata.

RUMANIO

K-do Aldalberto Karpati, B. R. Maria 9, *Arad* (ĉambropentristo), kĉl, PI, bfl, ankaŭ kun samprofesianoj pri fakaj temoj, L. Resp. certe.

Pagante vian membrokotizon? »»» ——→ Atentu la novan Tarifon! Vidu lastan paĝon!

SOVETIO

— Lernantaro de 20-a Sovet-lernejo, *Barnaul*, "Koĵzavod 2", pri ĉ. temoj kun infanaro ĉl.

— Laborista rondeto de felfabriko, *Barnaul*, Zavkom pimzavoda 2, pri lab. k junularaj temoj kĉl.

K-do Viktoro Falin, 7 linio 36, kv. 8, *Leningrad-34*, kĉl revol. studentoj. Interesaj L estos presitaj en stud. gaz.

K-dino Nosulina, Ĥolodnogovskij per. 7, *Ĥarkov*, Ukrainio, kĉl, pri ĉ. temoj, L, PI.

Adresŝanĝo. — K-do F. Ibrahimov loĝas nun: *Rokovski*, R-K, st. Ĥanĵimkova, Makievski rajon (antaŭe Ŝaxta, Ŝiglovski R-K). — La sama koresp. kun ministoj ĉl. pri vivo k lernejaj demandoj. Resp. garantiata.

K-do S. Bikelman, Graĵdanska 24/2, *Ĥarkov*, koresp. kun K-doj en Germanio k Ameriko.

K-dino R. Notik, str. K. Marx, 26, kv. 22, *Ĥarkov*, pri jun. movado, vivo de junulinoj, kom. infan-movado, kĉl.

K-dino S. Levandovska, str. Krapotkin 3, kv. 6, *Ĥarkov*, kĉl, pri ĉ. t.

K-do P. Griŝin (15 j. pioniro-lernanto), Radostnaja ul. 4, *Nikolaev, Ukrainio*, kĉl, pri pionirmovado, vivo en lernejoj k. a. temoj, PK, PI, gaz., ĵurn.

— Tuturbaj junkomunistaj organizoj serĉas seriozajn koresp-antojn en ĉl. Ĉiu propono estos respondita. Adr.: Ukrainio, *Nikolaev*, Zavod "A. Marti", Esperanto.

— Kelkaj grupoj de gelernantoj, 15—25 j., serĉas koresp-antojn en ĉl. pri ĉ. temoj. Proponojn sendu al: Ukrainio, *Nikolaev*, Zavod "A. Marti", Esperanto. Resp. gar. SAT-ano 7495.

K-dino Janina Ĵukovska, st. Osnova. nov. doma, Depovska 44, kv. 6, *Ĥarkov*, kĉl, pri ĉ. temoj.

K-do Bazilo Pokrovski, Brasovski politeknikumo, *Brasovo*, Brjanska distr., petas pardonon pro neresp. Kaŭzo: malproksima foresto. Nun mi dez. rekoresp. pri agronomio, kulturtekniko, politiko ktp. kĉl.

K-do A. V. Zaĥarov, *Kjappeselga*, Aŭton. Karelska SSR, kĉl, pri ĉ. temoj.

K-do A. Piscov (fervojisto), *Mariinsk*, Siberio, kĉl, pri ĉ. t. Resp. gar.

K-do V. Kotelevcev, str. Bogdanovskij per. 14, *Ĥarkov-6*, interŝ. librojn k gazetojn (esp. lingvajn). Resp. gar.

K-do V. Jabloŝevskij, Sverdlovskaja 2, kv. 5, *Minsk* (komjunulo), kĉl, PI, PM, resp. garantiata.

Radioamikoj, atentu!

Urallanda organizo de "ODR" (societo de radioamikoj) dez. koresp. kun laboristaj radioamikaj organizoj el ĉ. landoj, pri radio-movado.

Adr.: 9 *Sverdlovsk*, Puŝkinskaja, 1, Uralsovet ODR, al respondeca sekretario Batrakov.

KULTURBAZO

de granda fervojista klubo aranĝas konstantan modelan ekspozicion de internacia laborista korespondado. Esper. rondeto petas pri alsendo de gazetoj, ĵurnaloj, fotoj, literaturo, afiŝoj, insignoj ktp. laŭ adreso: *USSR, Moskvo* kalanĉevskaja placo, klubo "KOR" Esperanto.

K-do L. Rosental (komjunulo), Sovetskaja 26, kv. 9, *Minsk*, kĉl, PI, PM. Resp. garantiata.

K-dino Adlivankina, pl. Svobodij 13, kv. 15, *Minsk*, kĉl, precipe kun Anglio.

Al tutmonda gejunularo! — La komjunuloj-studentoj de Ĥarbarovska Mekanika Teknikumo koresp. kun junuloj ĉl. pri ĉ. temoj, precipe pri politiko, ekonomio k sociaj temoj kolektive k individue. Adr.: *Ĥarbarovsk*, Siberio, ul. K. Marksa 91, dlja jaĉejki VLKSM.

Nabat Molodeĵi (Sonorbato de l' junularo), bezonas gekorespondantojn el ĉl. Sendu L k artikolojn por enpreso k interkoresp-ado. Adr.: *Ĥabarovsk*, Siberio, Red. "Nabot Molodeĵi", ul. Kalininskaja 66.

— Geblindula rondeto (12), koresp. kun samsortuloj ĉl., pri ĉ. temoj, Brailsisteme, ankaŭ kun viduloj. Adr.: *Barnaul*, str. 2-a Altajska 41, (dom Slepiĥ).

K-do Tatarov (radioteknikisto), str. Mamontova 21, *Barnaul*, pri radioaferoj, precipe kun radiistoj pri ultramallongaj ondoj (5—10 m), gaz., ĵurn. Certe resp.

K-do Gajdukov (pentristo), 22-a Sovet-lernejo, *Barnaul*, interŝ. spertojn k pentraĵojn kĉl.-kolegoj.

— Virina kolektivo de kontraŭalkohola ĉelo koresp. pri kontraŭalkohola batalo en ĉ. l. Resp. gar. *Leningrad*, ul. Vosstania, 45, kontraŭalkohola ĉelo.

SVEDIO

— 3 K-doj-lernantoj koresp. pri ĉ. temoj kĉl, por perfektigi sin en esp. Respondu al: K-do Ake Olsson, Box 26-1, *Bromölla*.

Ruĝarmeano Eŭgeno Blinov

el Moskvo sciigas ĉiujn, ke li post la 15-a de januaro, finas sian militservon. Nun lia adreso estas: Sovetio, P. O. *Kuskovo*, pos. *Novo-Gireevo*, Internacionalnij prospekt d. n-o 14. *E. V. Blinov*. Li ĉiam akceptas proponojn pri koresp-ado k interŝ. de objektoj el ĉ. landoj, ankaŭ el Sovetio. Krom tio, li petas K-don Soares (6727) alsendi sian novan adreson.

SKRIBU EN NOTLIBRO:

Moskva Komitato de SEU
funkcias ĉiutage de la 6-a ĝis 9-a h. vespere (Moskvo, Spiridonovska, 15)
Ĉiuj venontaj Moskvon estas invitataj.
Poŝta adreso de MK SEU estas:
Moskvo, poŝt-kesto n-o 894

Adresojn de junkomunistaj, ateistaj k IRH-organizoj ni volonte publikigas senpage en Sovetaj esperanto-gazetoj.

Sekcio de fervojistoj esperantistoj

en USSR *Moskvo*, Kalanĉevskaja placo Klubo "KOR" donas informojn pri demandoj: esp. movado, profesiaj, politikaj, industriaj, kulturaj, klubaj ktp. Por resp. necesas kupono.

ENHAVO:

	pago
La mondo estas unuo	169
Fratoj, K-doj — Hungaroj	170
Provizora fino de la konstitucia batalo en Aŭstrio	170—171
Resumoj el la libro "Standards" (Normoj)	171
La kapitalistoj malatentas landlimojn	171
Mikrobo de kolektivismo	172
"Germanio super ĉio!"	172
Esperantista traktoro	172—173
Vaganta junulo en Argentino	173—174
Ĉu art-centro en Amsterdamo?	174
Korekto	174
Sennaciula Junulara Paĝo	175—176
Diskutejo	176
Esperanto-Servo	177
Tra Esperantio	178—179
Korespondado	179—180
Anoncoj	180

Jarkotizo al SAT: La unuaj nombroj, kiuj tuj sekvas la landnomon indikas la jarkotizon (sen abono) por Membro Aktiva kaj Membro Pasiva, — la nombroj inter krampoj indikas la aliĝmonon, kiun ĉiu *nova membro* devas pagi krom la ordinara kotizo, — membroj, kiuj nur renovigas la membrecon ne bezonas pagi aliĝmonon. — Organizoj, grupoj, societoj ktp. pagu minimume la duoblon de la jara kotizo por membroj.

Argentino 1.90 (0.40) pes.; Aŭstrio 3.75 (0.50) ŝil.; Belgio 3.10 (0.50) belg.; Brazilo 5 (1) milr.; Britio 3 (½) ŝil.; Bulgario 65 (10) lev.; Ĉeĥoslovakio 15 (3) kr.; Danio 2.50 (0.50) kr.; Estonio 1.80 (0.25) kr.; Finnlando 18 (4) mk.; Francio 12.50 (2.50) fr.; Germanio 2.50 (0.50) mk.; Hispanio 3.70 (0.70) peset.; Hungario 2.50 (0.50) peng.; Italio 12.50 (2.50) lir.; Japanio 2 (0.40) jen.; Jugoslavio 30 (6) din.; Latvio 2.50 (0.50) lat.; Litovio 5 (1) lid.; Nederlando 1.60 (0.30) guld.; Norvegio 2.50 (0.50) kr.; Polio 4 (0.80) zlot.; Portugalio 10 (2) esk.; Rumanio 65 (15) lej.; Sovetio 1.25 (0.25) rubl.; Svedio 2.50 (0.50) kr.; Svisio 3 (0.60) fr.; Turkio 1.25 (0.25) lir.; Usono 1.25 (0.25) dol. — Por aliaj ne cititaj landoj la kotizo estas samvalora al 2.50 mk. g. — En familio, kie estas pluraj SAT-anoj nur unu pagas la plenan kotizon, la aliaj nur la duonon, tamen nur tiu ricevas la Jarlibron, kiu plene pagis la kotizon.

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)